


HORIZONTO

IV-a JARO N-o 24 (6)
NOVEMBRO - DECEMBRO 1979

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Strasburgo
Katedralo

KONSTANTE FRAPANTE

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

LA FELIĈO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografia C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 6 - Novembro - Decembro 1979

E N H A V O

KONSTANTE FRAPANTE (D. Dalmau)
IVO LAPENNA — DUOBLA JUBILEO
(H. V. Rasmussen)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED),
Redaktas (Ivo Lapenna)
SUR LA SOJLO DE LA NOVA JARO
BELETRO
Noktaj Eroj del Destino (Edwin de Kock)
La Feliĉo (Zora Heide)
SIMPOZIO DE ILEI EN PARIZO,
Raportas (Jean Thierry)
KION VI NE LEGOS ALILOKE
Letero de la Greka Agadgrupo de NEM
AL ARTIKOLO DE «L'HUMANITÉ» RES-
PONDAS WILLIAM GILBERT (J. T.)
LIBROJ SUB LA LUPEO, Recenzas
(Liven-dek; G. Mora i Arana; J. Thierry,
R. Schulz)
LA VIª KONFERENCO EN STRASBURGO
(M. Muller)
KIO ESTAS KAJ KION CELAS N.E.M.

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk.
Zaragoza 00428398 (Jarabono 600 ptoj.), aŭ
la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,—
D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:
38,— F. Mk.

Franco:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle.
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,
D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8.
Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 180 n. din.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 10,— \$.


Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-
bono: 380 lfr.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)



EN LA 120.^a DATREVENO DE LA NAKISĜO DE DRO. LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

15 - 12 - 1979

En tiu ĉi memorinda tago por ĉiu vera esperantisto, mi uzas vortojn ĉiam aktualajn, de nia karmemora Delfi Dalmau, por omaĝi la Majstron.

I. G.

KONSTANTE FRAPANTE

ESPEREMO

Unu el la geniaj trafoj Zamenhofaj, ĉu logika aŭ magia, ĉu konscia aŭ intuicia, ĉu homa aŭ anĝela: la nomo de la lingvo internacia: Esperanto. —Senfinan esperon bezonas la esperantistoj, ĉiuj pacaj batalantoj por homara plibonigo, des pli malfacila se la plibonigo estas profunda, spirita.

Multaj gesamideanoj, eĉ eminentaj lingve, gramatike, organize —scienca aŭ arte eminentaj— se ili ne estis pri Esperanto senfine esperemaj, ili laciĝis, malvarmiĝis, velkis. Ili estis iel eminentaj, sed ne tiel ke ili ne trompiĝis pri nia afero. Se ili trompiĝis, almenaŭ ili devis tion kompreni, kaj elteni: senfine da semoj perdiĝas, ni semu kaj semu konstante. Se ĉiuj, kiuj seniluziĝis ne estus perditaj por Esperanto, nia movado estus nun jam tre potenca, kaj, pro potenco, influa, altira. Ankaŭ forto konvinkas homaron, ne nur logiko, argumentado.

Ni memoras eminentulojn de Esperantujo, kiuj malbone ekzemplis pro sia esperfiniĝo, aŭ pro tio ke ili ne trovis en nia movado sufiĉe da profito ia aŭ alia! Eble ili malesperis, eĉ pri la profito, mallonge antaŭ ĝia alveno. Ili estis generaloj kiuj laciĝis, forlasis bataladon foje ĵus antaŭ venko. Kaj tiel ili malutilis al si kaj al sia idealo, al la popolo kiu fidis ilin, ilian kuraĝon kaj scion. Tiuj iam eminentaj samideanoj malfidelis. Ili ne estis sufiĉe sentemaj al la interna ideo, al la spirito de Esperanto, al la profunda kaŭzo ke nia lingvo longe vivas, dum tiom da imitaĵoj kaj «plibonigoj» malsukcesas. Tiuj pioniroj timis agadi senprofite, ridindiĝi en sia familio aŭ socio, aperante stranguloj laborantaj por idealo verda! Normaluloj laboradas por normalaĵoj: oficiala religio, arto, scienco, metio: eklezio, muziko, kemio, industrio, komerco. Por strangaĵo: universala lingvo en neniu lando postulata, nur stranguloj okupiĝas, priokupiĝas. Universala lingvo estas angla kun dolaroj kaj sterlingoj, literaturo kaj scienco, postulata en ĉiuj Kontinentoj.

Sen La Espero kaj La Vojo, malforta estus Esperanto. Sen animo ne estas lingvo. Certe malsukcesas en Esperantujo ne Esperanto sed malbonaj esperantistoj.

JUNAJ KAJ MALJUNAJ

Oni multe diskutis pri juneco kaj maljuneco ĉe homo, kaj oni povas senfine diskuti, tiuteme, ĉar senfinaj estas la aspektoj kaj gradoj intermiksitaĵ de jun-maljuneco: estas infanoj seriozaj kiel maturaj homoj, kaj mezaĝuloj ridemaj, ludemaj kiel infanoj. Kondiĉoj de junulo estas vigleco, entuziasmo, imagemo, malavareco, fidemo. Ĉe junulo viveco estas abunda kaj li ĝin verŝas entrepreneme eĉ senatente pri riskoj aŭ danĝeroj. Ĉiuj entreprenoj ŝajnas al li facilaj, sukcesigeblaj, belaj, altiraj. Li sin donas al ĉio entuzias-

me, optimisme eĉ kuraĝe bataleme. Elreviĝoj, seniluziigoj sekvigas pripensemon, zorgemon, malrapidemon. Pli ol amemo, kreskas, poste, mastremo, ordonemo, ambicio por potenco, riĉeco. Ju pli multe mezaĝulo, maljunulo, posedas, des pli multe volas atingi. Li fariĝas avara, egoista. Ĉi tiuj kondiĉoj ĝenerale karakterizas maljunulon.

Sed en Esperantujo, militanta samideano, paca batalanto, eĉ plej maljuna, estas pli juna ol junulo baldaŭ laciĝanta, malesperema, ĉu pro timo al ridindiĝo aŭ al senprofita klopodado. Kun ni longe, porĉiam, restas nur saĝaj junuloj kaj junaj saĝuloj. La naivulo kredema ke ĉiuj homoj tuj fariĝos iaj anĝeloj sekvemaj, obeemaj, ĉar li malkovris kaj iomtempe predikas la Esperantosolvon, la naivulo kiu forgesas sian proprajn malkapablojn kaj malbonemojn kredante sin obeema al ĉiuj saĝuloj, tiu neeviteble baldaŭ abomenos ke la homoj — la aliaj, ne li! — estas stultaj, malsaĝaj, ne indaj ke iu strebadas por ilia bono. Ĉu ni ĉiuj ne estas stultaj, malsaĝaj, pri iu afero aŭ alia, pri iu temo aŭ alia? Ĉu ni multaj ne bezonas longan tempon por konscii aŭ kompreni ion, kio por aliaj estas tre simpla? Ĉu ni ĉiuj ne aperis pli-malpli sovaĝaj, hipokritaj, malhonestaj eĉ pri faroj por kiuj ni sentis bonfidon? Ĉu ne estas universala diro pri homo, ke li agis lupe en ŝafida vesto? Ankaŭ iu agadas ŝafide en lupa vesto! Kial ni pretendu ke tuj estu komprenota nia celo, nia bonvolo, nia praveco? Ke la kompleksa homaro tuj lernu Esperanton? Kaj tuj venu al ni beno?

Jes, nur saĝe junaj kaj june saĝaj homoj pri nia afero restas dumvive en niaj vicoj. Idealismo, entuziasmo, optimismo, sindonemo — juneco! — Seriozeco, bonfido, pacienco, persistemo — saĝeco!

Ni kore memoru eminentajn samideanojn kiuj estis niaj pioniroj antaŭ kvardek-kvindek jaroj, kiuj ankoraŭ gvidas nin fidele al nia celo. Ili estas saĝaj, inteligentaj, konsciaj, pri nia afero, pri homara naturo — honorindaj esperantistoj. Kaj ĉiuj humilaj samideanoj eltenantaj dumvive en Esperantujo pro amo al homaro estas pli honorindaj ol iama pioniro velkinta, malvenkinta! — Hazarde mi konstatis heroan laboradon de franca Dronchat kaj de aŭstralia Banham por nia afero. Nekonataj, tiaj herooj estas multaj en Esperantujo. Sekretaj fortoj de nia movado!

NOVAĴO SUR LA MERKATO DE LA DISKOJ

Jus alvenis en la kolekton de la diskoj APRAC laŭ la distribua cirkvito SFPP (el Parizo) disko de la pianisto Michel BRIGUET pri TRI ASPEKTOJ DE LA ROMANTIKISMO kun komentoj de la ludisto en la franca, angla kaj esperanta lingvoj. Tiel komenciĝas la prezento:

Ne pli ol la proksima disko «Kvar Sonatoj de la Jarcento de la Lumoj» pretendas kovri ĉiujn donitaĵojn de la Klasikismo, ĉi tiu disko havas la ambicion doni kompletan vidaĵon pri la movoj de l'koro kaj spirito, pri la sentoj kaj agmanieroj, kies rezultanto estas nomata Romantikismo. Se la verkoj de Chopin, Schubert kaj Liszt ĉi tie engravuritaj naskiĝis ja ĉe la plej intenso de la romantikisma fajrego, la foresto de Schumann, Weber, Mendelssohn aŭ Brahms sufiĉe memorigus la limojn difinitajn per la titolo (sub kiu titolo mem mi ofte donis komentitan recitalon, el kies programo tre granda parto estas ĉi tie retenita, dum la ĉi-suba teksto resumas parolan prezentadon harmonie aranĝitan per multaj ekzemploj).

Oni komencos per la heroeca romantikismo de la Polenezoj. La kvar el ili ĉi tie registritaj montras la evoluon, al kiu la genio de Chopin kuntrenas la polenezon inter 1826 kaj 1843... Kia kontrasto inter ĉi tiu heroa romantikismo kaj la romantikismo intima de la Laendler de Schubert, inter ĉi tiuj flamaĵoj kaj tiu ĉiutaga familiareco!... Fine kun la Funebraĵoj de Franz Liszt estas la romantikismo patosa (oni povus diri ankaŭ drameca, unu adjektivo koloras la alian)...

Sendube la muzikamantoj ĝoje rezervas sian plej favoran akcepton al tia muzika prezento, nova ilustrado de la Lingvo Internacia.

ĜOJAN KRISTNASKON - FELIĈAN NOVAN JARON

IVO LAPENNA

DUOBLA JUBILEO



Profesoro d-ro Ivo Lapenna, kiun dum 10 jaroj (1964-1974) estis prezidanto de UEA post antaŭaj 26 jaroj kiel komitatano kaj estrarano de IEL/UEA, kaj kiu en la pasinta jaro havis sian oran esperantistan jubileon, nun en la fino de 1979 havas du novajn jubileojn.

70 JAROJ

Ivo Lapenna naskiĝis la 5-an de novembro 1909 en Split, Jugoslavio, tiel ke la sama dato de la nuna jaro markas lian 70-jariĝon (pliajn biografiajn notojn legu ekzemple sur la kovrilo de lia *Hamburgo en Retrospektivo, Dua Eldono, 1977*).

Prof. Lapenna estas vere eksterordinara esperantisto. Ne estas maloftaĵo, ke inteligentaj kaj talentaj junuloj lernas Esperanton kaj dum kelkaj jaroj aktive laboras por disvastigi la lingvon. Sed kiel ofte ili daŭrigas disponigi siajn kapablojn tiucele? Dum sia kariero en la profesia vivo, irante al ĉiam pli altaj postenoj, ili trovas ĉiam malpli da tempo kaj forto por Esperanto — eble ankaŭ malpli da emoj, opiniante, ke ili per agado por tiu afero, kiu en neesperantistaj rondoj ja ofte estas konsiderata ridinda, malplivalorigas sin en la opinio de kolegoj kaj aliaj homoj kaj per tio perdas prestiĝon. Kontraste al ili Ivo Lapenna neniam ĉesis labori por Esperanto kaj la idealoj ligitaj al ĝi, kvankam sufiĉan motivon por dediĉi sin ekskluzive al sia scienco povus doni al li lia universitata kariero. Li estas nun profesoro pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono.

La nomo *Lapenna* aspektas italdevena kun signifo *la plumo*. Tio estas ja konvena nomo de persono, kiu estas majstro de la skriba kiel ankaŭ de la parola vorto kaj membro de la Akademio de Esperanto. Fakte, tamen, la nomo ne estas itala, sed devenas de la hispana la *peña*, kies signifo estas *la roko*. Kaj ankaŭ tiu nomo karakterizas sian posedanton, kiu ja plu staras firme kiel roko en sia sindediĉo al Esperanto, spitante ĉiujn atakojn al la lingvo kaj al li mem.

Pro siaj naturaj talentoj kaj sia faka specialaĵo en Zagreb li estis profesoro pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj — li estas en la plej alta grado kvalifikita por ĉefaj postenoj en la Esperanto-movado. Inter liaj talentoj estas, krom la oratora kaj la «pluma», neelĉerpeblaj energio kaj «roka» persistemo, dank' al kiuj li gvidis la konstruadon de la moderna UEA.

Tiu UEA «deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo» (par. 4 de la Statuto de UEA), kaj la strebadoj de prof. Lapenna estas en plena harmonio kun tiu fundamenta principo de la asocio, la humaneca humanismo, kiu bedaŭrinde en la nuna tempo estas tro ofte forgesata kaj neglektata. Konforme al tiu idealo li trovas tempon por doni siajn servojn kiel jura konsilanto al la ĉefsekretario de Amnestio Internacia en Londono.

ANTAŬ 25 JAROJ: MONTEVIDEO

Kiu alia persono ol prof. Lapenna estus povinta — per tiom da inteligenteco kaj profunda scio, tiom da energio kaj persistemo — kiel observanto de UEA dum la 8-a Sesio de la Generala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 akiri por Esperanto tiel pozitivajn rezultojn? La 8-an de decembro 1954 la pleno de la konferenco aprobis la konsenton de konsultaj aranĝoj inter Unesko kaj UEA, kaj la 10-an de decembro 1954 la pleno akceptis la jenan *rezolucion*:

IV. 1.4.222 La Generala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Generala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;

IV. 1.4.221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV. 1.4.222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV. 1.4.223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Generalan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV. 1.4.224 Komisias la Generalan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

Pri la nervostreĉa laboro de prof. Lapenna kaj liaj helpantoj por atingi akcepton de la rezolucio (kaj pri estiĝo de la nocio *blinkenbergo*) oni povas legi en *Esperanto en Perspektivo*, p. 767-773, kaj — kun pli da interesaj detaloj — en *Horizonto*, n-roj 6-3 (1976-77).

GRATULON KAJ DANKON

Gratulon al Ivo Lapenna pro la 70 jaroj kaj dankon pro lia venko en Montevideo kaj pro liaj multnombraj aliaj servoj al la Esperanto-movado!

H. V. Rasmussen

SUR LA SOJLO DE LA NOVA JARO

Dum kvar jaroj *Horizonto* sukcese plenumas sian pozitivan rolon. Sur ĝiaj paĝoj aperis artikoloj, eseoj, literaturaĵoj, dokumentaj materialoj rilatantaj al la nuntempa Esperanto-Movado, recenzoj kaj aliaj tekstoj. Inter la kontribuintoj troviĝas granda nombro da bone konataj nomoj en la Movado, parte ankaŭ ekster ĝi. Pluraj estas verkistoj, poetoj, scienculoj, membroj de la Akademio de Esperanto.

La bazaj principoj de *Horizonto* estis, estas kaj restos senkompromisa vero kaj fideleco al la partipolitika kaj religia neŭtraleco, respondanta al la neŭtrale homa karaktero de Esperanto, difinita kaj prilaborita laŭlonge de la historia linio, kiun markas la nomoj Zamenhof-Hodler-Privat-Lapenna, kaj praktikata ankaŭ en UEA ĝis la okazaĵoj de Hamburgo meze de 1974. Sekve, post la UK de Hamburgo *Horizonto* necese fariĝis la ĉefa laŭtparolilo de la neŭtrala Esperanto-Movado. En tiu rolo *Horizonto* neniel agas kontraŭ UEA, kiel iuj rondoj sisteme misinformas, sed kontraŭ la *misgvidado de UEA* kun la sola celo konsciigi la esperantistaron per objektiva prezento de faktoj kaj tiel atingi, ke UEA refariĝu neŭtrala laŭ la ĝishamburga koncepto de neŭtraleco, tial ankaŭ nedependa de ekstermovadaj politikaj fortoj. Agante tiel, *Horizonto* jam iom kontribuis, almenaŭ formale, al malebligo aŭ malrapidigo de eĉ pli fatalaj eraroj, kiel prave notis la Rezolucio de la 5-a Konferenco de N.E.M. Sufiĉas mencii la ŝanĝojn (kvankam bedaŭrinde nur formalajn) en la partipolitikaj programoj de la bulgara BEA kaj de la t.n. Laborrondo Esperanto en GDR; aŭ la ŝokiĝon pro la persekutoj de esperantistoj Svaĉek kaj Srna, ktp. Eĉ kelkaj malgrandaj plibonigoj en la statutprojekto de UEA ŝuldiĝas al konstruaj kritikoj de *Horizonto*, kio, kompreneble, estis prisilentita en la publikaĵoj de UEA.

Horizonto daŭrigos la saman pozitivan linion ankaŭ en 1980, sed la redakcio klopodos ankoraŭ plibonigi kaj pli variigi la enhavon por maksimume kontentigi ĉiujn legantojn. El multaj gravaj demandoj, pritraktotaj en *Horizonto*, la plej aktuala estas la lasta statutprojekto, kiu preskaŭ certe fariĝos Statuto de UEA. Tio ankaŭ formale konfirmos la kontraŭneŭtralecan posthamburgan praktikon. Tuj post la publikigo de la rezulto de la nuna voĉdonado *Horizonto* publikigos analizon kaj komenton de Prof. Lapenna, kiu pro siaj longjaraj spertoj en UEA kaj profesia kompetenteco estas pleje kvalifikita por tiu tasko.

Malgraŭ la inflacio, la abono al *Horizonto* restis senŝanĝa dum plenaj kvar jaroj. Bedaŭrinde, la plia granda altiĝo de la kostoj devigas nin altiĝi la bazan abonon je 20%, kiel indikite sur la unua interna kovrilpaĝo. Ni estas certaj, ke ĉiuj abonantoj komprenos la neceson de tiu paŝo kaj ni tre petas ilin ne nur tuj renovigi sian abonon, sed ankaŭ havigi multajn novajn abonantojn ĉu per varbado, ĉu per abondonacoj al geamikoj en landoj, en kiuj oni ne povas aboni nian komunan, neŭtralan kaj sendependan kulturalan revuon. Nun, eble pli ol iam antaŭe, ĉiuj sinceraj esperantistoj bezonas objektivan informiĝon per *Horizonto*, kaj *Horizonto* bezonas firman kaj vastan apogon de ĉiuj sinceraj esperantistoj. Se oni konsideras, ke en pluraj landoj unu ekzemplero de *Horizonto* ofte estas legata eĉ de dekoj da personoj, *Horizonto* jam estas unu el la plej legataj Esperanto-periodaĵoj, kvankam certe ne la plej abonata. *Per komunaj fortoj ni atingu, ke en 1980 ĝi fariĝu eĉ pli legata kaj unu el la plej abonataj.*

Anticipan dankon pro via helpo kaj plej feliĉan Novan Jaron al la kunlaborantoj, abonantoj kaj legantoj.

La Redakcio kaj Administracio

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. Ivo Lapenna

N-ro 18

31 KONTRAŬSTATUTA ELEKTO DE LA ESTRARO DE LA AKADEMIO

31.1 *Enkonduka Rimarko.* — La ĵus okazinta elekto de la Estraro de la Akademio de Esperanto estis tiel aranĝita, ke ĝi pli similas al nomigo fare de la prezidanto ol al normala laŭstatuta elekto. Ĉar la situacio en la Akademio ne koncernas nur ĝiajn membrojn, sed estas afero, kiu interesas, aŭ devas interesi, la tutan esperantistaron, la redaktoro de tiu ĉi rubriko, samtempe unu el la plej malnovaj membroj de la Akademio, decidigis publikigi la plej esencajn faktojn.

Oni povis esperi, ke almenaŭ la Akademio estos ŝparita de tiaspecaj agoj, kiuj devus ne okazi en kiu ajn institucio bazita sur demokrataj principoj eĉ se la prezidanto havis la plej bonajn intencojn, kiel li asertas kaj mi plu deziras kredi. Per prudento kaj iom da bona volo la krizo, provokita tute superflue, povas esti kontentige solvita eĉ en tiu ĉi malfrua stadio. Tio estas en la intereso de la Akademio, de ĝiaj digno kaj prestiĝo, sen kiuj ĝia rolo de «nependenda Lingva Institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon» (art. 1 de la Statuto), ne estas imagebla.

31.2 *Anonco de la Elekto kaj Unuaj Reagoj.* — Prof. G. Waringhien, la prezidanto de la Akademio, anoncis la elekton per sia Cirk. n-ro 126 de la 20-a de junio 1979. En ĝi li deklaris, ke pro sia aĝo kaj pro la neceso rejunigi la kadrojn de la Akademio, li decidis forlasi la postenon de prezidanto, kiun li okupas jam de 16 jaroj. La sekretario-kasisto, s-ro R. Bernard, decidis sekvi lian ekzemplon kaj forlasi sian postenon. La anonco tekstas:

«Post kelka insisto mi decidigis mian amikon William Auld akcepti la kandidatecon al Prezidanteco, kaj li nun prezentas jenan liston por la Estraro: prezidanto William Auld; vicprezidantoj Paul Neergaard, Stojan Guĝev; sekretario Albert Goodheir. Kompreneble, aliaj kandidatoj por la prezidanteco estas akcepteblaj: se iuj havas la intencan prezenti alian liston por la Estraro, mi petas ilin bonvoli informi min pri tio antaŭ la 1-a de julio.»

Per sia letero de la 12-a de julio 1979 Akademiano Mag. R. Rossetti formale informis la prezidanton, ke li «konsterne legis la proponon pri Auld kiel sekvonta nia prezidanto». Samtempe li kontraŭproponis Akademianon Kawasaki, «kies elstarajn meritojn mi ne bezonas substreki».

Tuj post la reveno el Australio, la 18-an de aŭgusto 1979 mi skribis al la prezidanto apoge al la letero de Akademiano Rossetti. En tiu letero mi skribis interalie: «Aldone al Kawasaki, kiun proponas Rossetti, mi nur mencias la nomojn de Minnaja, Neergaard, Régulo Pérez, Pennachietti, Piron kaj Wells». En la fino mi skribis:

«En ĉiu okazo mi ege bedaŭras, ke vi ne ebligis al la membroj de la Akademio interkonsiliĝi pri eventualaj kandidatoj, tiel ke ni povu elekti Estraron, kiu el ĉiuj vidpunktoj estu kiel eble plej taŭga kaj reprezenta. Mi insiste petas vin tuj ebligi tion per deklaro al la Akademio, ke la kandidatigo de s-ro William Auld estas via persona propono kaj ke la membroj de la Akademio rajtas prezenti aliajn proponojn plej malfrue ĝis la 31-a de decembro de tiu ĉi jaro.»

31.3 *Unusola Listo kaj Plia Oficiala Propono.* — Per sia longa persona letero de la 27-a de aŭgusto la prezidanto informis min, ke li ĵus, t.e. la 27-an, ricevis mian oficialan leteron de la 18-a de aŭgusto, do tro malfrue, ĉar lia Cirk. n-ro 127 de la 27-a de aŭgusto estis verkita de li jam la 20-an forsendita de la sekretario la 25-an de tiu monato. Mi ne deziras dubi pri la ĝusteco de tiuj informoj, sed en ĉiu okazo, eĉ se la Cirk. 127 estis jam ekspedita, nenio malhelpis sendi plian cirkuleron kun mia propono, esence grava por okazigo de elekto en bona ordo. Mi mem ricevis lian leteron de la 27-a jam la 29-an, do 2 tagojn post la ekspedo, kaj la saman tagon denove petis prokraston de la elekto ĝis la fino de la jaro por ebligi aliajn kandidatigojn. Samtempe mi proponis akademianon Mag. Reto Rossetti kiel plian taŭgan kandidaton por la prezidanteco, se li konsentas.

Nur post tio kaj post mia forveturo al la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Ateno, estis liverita la menciita Cirk. 127 de la 27-a de aŭgusto, kiun mi trovis hejme post la reveno la 30-an de septembro. En tiu cirkulero la prezidanto informis pri la sinkandidatigo de s-ro R. Hauptenthal al la posteno de Sekretario-Kasisto de la Akademio. Per la sama cirkulero la prezidanto voĉdonigis la Akademion pri la sola listo, proponita de li mem kaj de la prezidanto-kandidato, kun aldonado de s-ro Hauptenthal kiel plia kandidato al la posteno de sekretario-kasisto. Li ankaŭ informis, ke la voĉdoniloj devas atingi la adreson de la sekretario antaŭ la 1-a de oktobro.

Konstatinte tion, la 6-an de oktobro 1979 mi proponis en oficiala letero al la prezidanto, ke la elekto de la Estraro estu nuligita pro tri gravaj principaj kaj formalaj kaŭzoj. La teksto de la propono, pri kiu mi petis voĉdonigon de la tuta Akademio estis:

«La elekto de la Estraro de la Akademio de Esperanto, aranĝita per la cirkulero n-ro 127 de la 27-a de aŭgusto 1979 estu nuligita kaj nova elekto estu aranĝita komence de 1980 por ebligi al la membroj de la Akademio interkonsiliĝi kaj eventuale prezenti pliajn kandidatojn ĝis la 31-a de decembro 1979.»

La kvintesenco de la propono estas entenata en mia letero de la 29-a de oktobro, kiu komplete aperas sube kaj tial ne necesas resumi la argumentojn ĉi tie. Necesas tamen atentigi, ke mi eksplicite petis la prezidanton ne nur voĉdonigi la Akademion, pri la menciita propono, sed ankaŭ sendi al ĉiuj membroj la kompletan tekston de la letero de la 6-a de oktobro.

31.4 *Apogoj al la Propono pri Nuligo de la Elektro.* — La proponon de la 6-a de oktobro mi sendis fotokopie 2-3 tagojn poste nur al kelkaj membroj de la Akademio. Kvar akademianoj apogis la proponon per leteroj al la prezidanto kun kopioj al mi.

Akademiano R. Rossetti skribis en sia letero de la 10-a de oktobro:

«Ĉiupunkte mi aprobas viajn leteron kaj proponon al Waringhien, kaj tion mi hodiaŭ indikos al li... Via protesto al Waringhien estas modelo de ĝentileco kaj metodo, kaj mi ĝojas, ke vi elpaŝis. Mi esperas, ke ankaŭ iuj aliaj ekmurmuris pri la arbitra procedo de nia prezidanto.»

Akademiano Pastro W. J. Downes skribis interalie en sia letero de la 16-a de oktobro al la prezidanto, ke li donas sian tutan konsentos al la propono kaj plenforte subtenas mian peton, ke la prezidanto sendu al ĉiuj membroj ankaŭ kopion de mia letero de la 6-a de oktobro. Li daŭrigis:

«Mi estas danka al D-ro Lapenna pro tio, ke li tiel klare kaj precize esprimis tion, kion li, kaj plejble multaj aliaj akademianoj, sentis pri la proceduro. Ĝi estis tiel multe diferenca de tiu, kiun oni uzis je antaŭaj voĉdonigoj. Ĝi estis des pli bedaŭrinda pro tio, ke la voĉdonado koncernis la du plej gravajn oficojn de la Akademio. Al mi ĝi havis la aspekton de afero, kiun oni faris en la kulisoj, ne sur la scenejo. Io nekonata al la Akademianoj estis okazinta antaŭ la voĉdonigo, kaj tio estigis demandojn, eĉ suspektojn, kio kaj kial? Plejble estis bonaj motivoj, sed ni ne sciis ilin...»

Akademiano D-ro André Albault skribis, interalie, en sia letero de la 16-a de oktobro al la prezidanto:

«Fakte la argumentoj estas validaj kaj solidaj... Elektro de nova Estraro kaj ĉefe de nova Prezidanto estas fakte unu el la plej gravaj agoj de nia Instituto. Akademia periodo valoras laŭ ĝia prezidanto kaj laŭ la kunigiteco de la membroj ĉirkaŭ sia Prezidanto. Kaj efektive manko de antaŭa diskutadopovas kuntreni pasivecon kaj lasi al la membroj la impreson, ke ne okazis elektoj. Mia persona opinio estas, ke en tia grava elekto eĉ se nur unu petas prokraston, tio ne povas esti rifuzita... Pro tio mi apogas la peton de Prof. Lapenna voĉdonigi la Akademion.»

Akademiano Prof. J. Régulo Pérez skribis en sia letero de la 19-a de oktobro al la sekretario-kasisto por la prezidanto:

«Post konscienca pripensado, mi opinias, ke la juraj konsideroj de Kolego Lapenna estas fundamente atentindaj, kaj sekve mi apogas, ke la Akademio voĉdonigu la membrojn pri la propono de Prof. Lapenna rilate nuligon de la ĵusa voĉdono por elekto de la nova Estraro. Kaj, se plimulto tion decidus, ke la Akademio rearanĝu novan voĉdonon.»

31.5 *Rifuzo Voĉdonigi la Akademion kaj Lasta Reago.* — Okazis plia korespondado inter kelkaj Akademianoj kaj interŝanĝo de leteroj inter la prezidanto kaj mi. Per sia letero de la 24-a de oktobro al mi ankaŭ akademiano D. B. Gregor esprimis «plenan konsenton» kun la propono de la 6-a de oktobro, sed estis tro malfrue por skribi al la prezidanto, ĉar intertempe alvenis lia Cirk. n-ro 128 de la 22-a de oktobro, per kiu li informis pri la rezulto de la voĉdonado. Do, tiu tuta korespondado estis vana. La prezidanto rifuzis voĉdonigi la Akademion pri propono de 5 ĝiaj membroj rilate gravegan proceduran demandon. La membroj de la Akademio, kiujn ĉefe koncernas la maniero, laŭ kiu estis aranĝita tiu «elekto» — laŭ mia scio unika en la historio de la Akademio — jam ricevis tiun cirkuleron kaj tial mi ne ripetos ĝian enhavon. La aliaj legantoj facile komprenos pri kio temas el mia reago publikigita sube. Ĉi tie estu nur aldonite, ke laŭ la menciita Cirk. 128 estas elektitaj s-roj W. Auld kiel prezidanto, D-ro Neergaard kaj Prof. Guĝev kiel vicprezidantoj, kaj A. Goodheir kiel sekretario-kasisto.

Jen la kompleta teksto de mia lasta reago:

Prof. D-ro Ivo Lapenna
77, Grasmere Avenue,
Wembley, Middx. HA9 8TF.

Londono la 29-an de oktobro 1979
Kopie al kolegoj D-ro Albault,
Pastro Downes, Prof. Régulo,
Mag. Rossetti kaj s-ro D. B. Gregor

Al Prof. G. Waringhien,
Prezidanto de la Akademio de Esperanto,
Tour Tokyo 1251 - 20 Av. D'Ivry,
F 75645 Paris Cedex 13.

Estimata Prezidanto,

La enhavo de via cirkulero n-ro 128 de la 22-a de oktobro 1979 devigas min esprimi al vi mian plej fortan proteston pro jenaj kaŭzoj:

1. Jam la 18-an de aŭgusto, do antaŭ ol vi forsendis la cirkuleron de la 27-a de aŭgusto, mi oficiale petis vin prokrasti la elekton ĝis la fino de la jaro por ebligi ev. aliajn kandidatigojn. La samon mi ripetis la 29-an de aŭgusto. Estis via devo kiel prezidanto

observi oficialan peton de membro, faritan ekskluzive en la intereso de la Akademio. Konsterne por mi, vi malatentis ĝin kaj anstataŭe tuj voĉdonigis la Akademion pri la sola kandidato, kiun vi mem elektis kaj rekomendis. Tio devigis min fari la proponon de la 6-a de oktobro *al la Akademio* pere de vi kiel ĝia prezidanto pri la nuligo de la nun aranĝita elekto kaj laŭorda okazigo de nova elekto komence de 1980. Diference de tio, kion vi asertas en via cirkulero 128, mian proponon apogis ne nur kolegoj Rossetti kaj Albault, sed ankaŭ Downes kaj Régulo, do preskaŭ ĉiuj, al kiuj mi sendis fotokopion de la propono. Estis kaj plu estas via devo voĉdonigi la Akademion pri propono de 5 membroj (v. ankaŭ art. 13 de la Statuto, certe aplikebla ankaŭ en tiu ĉi kazo) kaj ne pre-judice aserti, ke «la propono pri nuligo havas tro malmulte da ŝancoj esti akceptita», kiel vi faris. Eble vi pravas, eble ne, sed en ĉiu okazo ne estas tasko de la prezidanto donadi tiajn arbitrajn juĝojn kaj sub tia kaj similaj pretekstoj rifuzi voĉdonigon.

2. En mia propono de la 6-a de oktobro mi eksplicite petis, ke vi sendu al ĉiuj membroj *la kompletan tekston de tiu letero*. En sia letero de la 16-a de oktobro Pastro Downes same eksplicite petis vin, ke vi sendu al ĉiuj membroj *kopion de mia letero de la 6-a de oktobro*. Anstataŭ agi tiel, kiel vi estus devinta agi eĉ sen tiuj eksplicitaj postuloj, vi laŭplaĉe resumis ĝian enhavon, sen kia ajn mia scio, por povi tiel «kontraŭargumenti» ne miajn argumentojn, sed deformitajn argumentojn laŭ via propra resumo. Tion mi rigardas ege malkorekta principe kaj mallojala persone.

3. Vi mem rekonas, ke vi dum tre longa tempo «per korespondado kaj kongresaj konversacioj» serĉis taŭgan kandidaton kaj fine faris vian proponon. Tio estas via rajto kaj devo. Sed kun kiu rajto vi senigis la aliajn membrojn de la Akademio de la samaj rajtoj kaj devo? Dum vi «esploris» la aferon plurajn monatojn, eble eĉ jarojn, vi postulis en la Cirk. 126 de la *20-a de junio*, ke oni eventuale prezentu al vi alian liston *antaŭ la 1-a de julio*, kio evidente malebligis kian ajn alian kandidatigon. Multaj membroj eĉ ne povis ricevi vian cirkuleron antaŭ la 1-a de julio por ne paroli pri prezento de bone pripensita alternativa listo. Tamen la sorto kaj estonteco de la Akademio ne estas nur via zorgo, sed zorgo de ĉiuj ĝiaj membroj.

4. Vi asertas, ke oni estus povinta per «simpla telegramo» konigi sian intencon kaj ke vi estus lasinta al la iniciatinto «la tutan necesan tempon por trovi siajn samlistanojn». Unue, kial, do, fiksi la 1-an de julio kiel limdaton, kion ĉiu serioza leganto *devas kompreni kiel limdaton*, se vi tamen anticipe intencis doni al la iniciatinto «la tutan necesan tempon»? Due, kial postuli de la aliaj eĉ sendon de telegramo, dum vi mem prenis por vi amason da tempo por trovi vian kandidaton? Tria, mi mem, tuj post tralego de via Cirk. 126, jam la 18-an de aŭgusto petis prokraston kaj samtempe menciis nombron da aliaj kandidatoj, *sed vi ne donis al mi la necesan tempon por prezenti alternativan liston*. Vi eĉ ne donis tempon por interŝanĝi pensojn pri la meritoj de la kandidatoj proponitaj de vi resp. de la kandidato al la prezidanteco.

5. Same nekredeble mallongan tempon vi donis por la voĉdonado mem, *nome eksplicite antaŭ la 1-a de oktobro*. Nun montriĝas, ke vi arbitre, ne informinte anticipe la membrojn, ŝanĝis la limdaton *al la 15-a de oktobro*. Reveninte hejmen la 30-an de septembro mi tuj telefonis el Londono al la sekretario, s-ro R. Bernard, por protesti ankaŭ por tiu mallongeĝa tempolimo. Tamen, 2-3 tagojn poste, mi sendis mian voĉdonilon, nur por vidi ĉu ĝi estos prenita en konsideron. Nun mi vidas, ke vi akceptis ĝin kiel validan. Fakte, tiu mia voĉdonilo, same kiel ĉiuj aliaj ricevitaj post la 30-a de septembro, devis ne esti prenitaj en konsideron, ĉar la limdato pasis. Se vi jam faris la eraron fiksi tiel mallongan tempolimon, vi devis ne fari alian eraron, nome kalkuli kiel validajn la voĉdonojn ricevitajn post tiu limdato. Kaj kial, cetere, ĝuste la 15-a de oktobro? Kial, se kolego De Diego ne almetis la mencion «elektitoj», lia letero ne estis malfermita kaj, pro tiu eraro, li ne povis ricevi novan balotilon? Kaj kial balotiloj ricevitaĵ inter la 1-a kaj 15-a de oktobro estis validaj, dum li estis senigita de la rajto voĉdoni pro tiu plua eraro en tiu ĉi elekto tiom antaŭaranĝita?

6. Ne temas pri trovo de proceduro, kiukontentigus la plimulton, kiel vi asertas, sed pri apliko de laŭorda proceduro, konforma al la spirito de la Statuto kaj al ĉiuj precedencoj, do proceduro, *kiu kontentigas ĉiujn*.

7. Fine, la fakto, ke tiel multaj kolegoj voĉdonis por la sola listo neniel signifas, ke ili ne estus voĉdonintaj alimaniere, se ekzistus alia listo, aŭ almenaŭ pluraj kandidatoj por la diversaj postenoj, aŭ eĉ se nur la membroj estus havintaj la eblecon interŝanĝi la pensojn pri la meritoj de la unuopaj kandidatoj. Kiel konate, ĉkzistas en la mondo elektosistemoj, en kiuj la sola listo de kandidatoj ĉiam ricevas eĉ pli ol 99% de la esprimitaj voĉoj. Mi ne opinias, ke tia elektosistemo estas taŭga por la elektojn en la Akademio. Mi eĉ kuraĝas fidi, ke la «elektitoj» mem ne estas tre kontentaj, ke ili estis «elektitaj» en tiel evidente manipulita elekto. Mi mem certe malakceptus la rezultojn de tia «elekto».

Pro ĉio supre dirita mi bedaŭrinde ne povas konsenti, ke la elekto estis farita laŭ «demokrata maniero» kaj tial ankaŭ ne povas rigardi la rezulton kiel reflektantan la opinion de la Akademio en tiu ĉi gravega afero. Tute aparte mi bedaŭras, ke post tiom da jaroj da kunlaborado en la Akademio kaj ekster ĝi, ĉiam por la bono de nia afero, viaj lastaj agoj kiel prezidanto devigis min al tiu ĉi paŝo.

Kun estimo,
sincere via
D-ro Ivo Lapenna

31.6 *Konkluda Rimarko.* — La publikigon de la supraj informoj pri faktoj mi rigardas kiel plenumon de devo al la Akademio kaj, pli vaste, al la Esperanto-Movado. Aparte mi akcentas, ke, laŭ mia kompreno de demokrata proceduro, neniu, eĉ ne la plimulto, povas senigi membrojn de ilia rajto kaj devo proponi kandidatojn kaj diskuti pri iliaj meritoj. Surbaze de la prezentitaj faktoj ĉiu leganto povos facile formi sian propran opinion pri la valideco de tiaspeca elekto. Mi mem formis la mian.

Superflue diri, ke tiu ĉi malkonsento pri grava procedura punkto neniel ŝanĝas mian altan respekton por la grandega verko de Prcf. G. Waringhien. Mi fidas, ke li celis nur bonon, sed mi mem kaj la aliaj apogantoj de mia propono, certe ne malpli ol la prezidanto, same tiel celas nur la bonon.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 20 de Esperanto en Perspektivo.

32 PLIA KONTRAŬNEŬTRALECA FALSAĴO: FASISMO KULPAS PRO LA PERSEKUTOJ DE ESPERANTISTOJ EN USSR

En la ĉefartikolo de *Horizonto* n-ro 4/79, p. 69, kaj en la rubriko ED publikigita en n-ro 5/79 estas analizita la partipolitika karaktero de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). En la oktobra numero de *Esperanto*, organo de UEA, aperis artikolo de Boris G. Kolker, ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio, sub la titolo «Landa Movado sur Nova Nivelo» okaze de la fondiĝo de ASE. En tiu artikolo, kiel oni povis atendi, troviĝas pluraj misprezentoj, el kiuj la plej ŝoka estas jena historia falsaĵo:

«*En la fino de la 30aj jaroj okazis malaktiviĝo de la movado / en Soveta Unio, mia rim. / . Tion kaŭzis unuavice la katastrofa malboniĝo de internaciaj rilatoj, kiu manifestiĝis en faŝismiĝo de Eŭropo, la dua mondmilito kaj la «malvarma» milito ktp.*»

Do, laŭ tiu aserto de ĉefdelegito de UEA, publikigita en la oficiala organo de UEA, ne temis pri senprecedencaj persekutoj kaj mortigoj de esperantistoj, sed pri «malaktiviĝo» de la Esperanto-Movado en tiu lando. Kaj pri tiuj krimoj, maskitaj per la vorto «malaktiviĝo», ne respondecas la stalinisma soveta reĝimo, sed kulpas la «faŝismiĝo de Eŭropo», la dua mondmilito kaj la «malvarma» milito!

Kompreneble, la konantojn de la historio de la Esperanto-Movado ne trompos tiaj falsaĵoj, sed multajn aliajn ili povus facile trompi, des pli ke la prezidanto de UEA sur p. 165 de la sama numero flate asertas, ke la esperantistoj «*estas pretaj submetiĝi al la komuna volo kaj la komuna idealo, se ĝi estas prezentita senvuale kaj maksimume honeste.*»

Nu, vere senvuale kaj maksimume honeste D-ro U. Lins prezentis la persekutojn de Esperanto-parolantoj en diversaj landoj, inkluzive Sovetan Union, unue en sia libro *La Danĝera Lingvo* (1973) kaj taj poste en Ĉap. 21.4.1 de *Esperanto en Perspektivo* (EeP). Interalie li skribis pri la persekutoj en Soveta Unio:

«*Drezen estis mortpafita en 1937, same kelkdeko da gvidantoj. En Ĥarkov pereis en la sama jaro du bone konataj esperantistoj, V. Kolĉinskij («Elsudo») kaj V. Kuzmiĉ... Ordinaraĵoj de SEU suferis dum deko aŭ pli da jaroj pezan punlaboron en siberiaj koncentrejoj, dividante tiun sorton kun multegaj aliaj viktimoj de la stalina teroro; el ili nur tre malmultaj revenis, el la pli konataj nur G. Demidjuk kaj P. Sumilov. Inter la funkciuloj de la postmilita renaskiĝinta Movado en Soveta Unio troviĝis nur tri iamaj ĉefaktivuloj de SEU: S. N. Podkaminer, Gurgin Sevak kaj E. A. Bokarev... Rilate la nombro de la viktimoj tre diverĝas la taksoj: laŭ Rytĵikov, 30.000 estis arestitaj, el kiuj la plej multaj pereis; esperantistoj en GDR foje parolis pri 2.000 mortintoj» (P-oj 722-723).*

Tio estas la senvuala kaj maksimume honesta vero, objektive prezentita de D-ro Lins, nuntempe unu el la trimembra Estraro de la nova CED de UEA. Oni devus atendi, ke tia objektivaj historiistoj publike protestos pro tiu falsaĵo publikigita en la organo de UEA.

Necesas aldoni, ke la 19-an de marto 1973, do antaŭ la hamburgaj eventoj de 1974, la «reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialisma landoj, kiuj kunvenis en Budapeŝto la 19-an de marto 1973» adresis pere de s-ro N. Aleksiev, tiama prezidanto de la bulgara BEA, fortan proteston al la CO kaj al mi kiel tiama honorofica direktoro de CED pro la intenco publikigi Ĉap. 21.4.1 de *EeP*. La «protestintoj» iamaniere estis eksciintaj pri tiu parto de la verko pli ol unu jaron antaŭ la publikigo. En la protesto estis ankaŭ dirite:

«*Ni ne vidas socian bezonon de nova aktualigo de tiu temo /persekutoj kontraŭ Esperanto en Soveta Unio kaj 'socialisma landoj' en la tempo de stalinismo, mia rim./: ia plej aŭtoritataj gvidorganoj en la koncerna landoj delonge likvidis tiun praktikon kaj agas tute male... Prave tiuj rondoj kaj la esperantistaro en niaj landoj /ĉu fakte la esperantistaro?, mia rim./ pritaksos ĉion ĉi kiel antisocialisman manovron. Tio povas nur malutili al nia estonta agado... Ĉiuokaze ni postulas /substrekitaj en la originalo/, ke en la eldono de UEA aperu nur informoj, kiuj estas aprobitaj de la esperantistoj /legu: altruditaj de la partifunkciuloj en la koncerna lando, mia rim./ . Ni protestas kontraŭ la memcela aperigo de la ĉapitro 'Persekutoj kontraŭ Esperanto', ĉar ĝi povas alporti nur damaĝon por la afero de la Internacia Lingvo.»*

En mia verko *Hamburgo en Retrospektivo*, p-oj 52-53, estas iom pli detale prezentita tiu «postulo», kiun la tiama Estraro de UEA laŭ mia propono nete rifuzis kaj, kiel ko-

nate, la koncerna ĉapitro aperis en *EeP*. En la menciita libro mi komentis: Se fakte la «gidorganoj» jam likvidis tiun praktikon kaj agas male, do la prezento de persekutoj sub stalinismo devus kontribui al «likvidado de tiu praktiko» kaj fortikiĝi la «malan agadon». Kaj se la prezento de la persekutoj estas «pritaksata» kiel «antisocialisma manovro», ĉu, do, la persekutoj estis «socialisma manovro»? Mi ankaŭ skribis laŭvorte:

«*Estus interese vidi kiel reagas la nuna Estraro, plene dependa de la bloko kaj ĝiaj okcidentaj aliancanoj, je tiaspeca protesto.*»

Klaran respondon donas la falsajo publikgita en *Esperanto*. Tio estas nur unu el la multaj kazoj, kiuj montras la esencan diferencon inter ĉiuj ĝishamburgaj estraroj de UEA, firme sendependaj kaj observantaj nur la Statuton de la Asocio, kaj la posthamburgaj gvidantaroj troviĝantaj sub forta influo kaj daŭre kreskanta premo de partipolitikaj instancoj en *UEA mem.*

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 21.4 de EeP.

33 ESPERANTISTOJ SVÁČEK KAJ SRNA KONDAMNITAJ KONDIĈE

En la eroj 22 kaj 28 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-roj 6/78 kaj 2/79) troviĝas detalaj informoj pri la kriminaljuraj persekutoj kontraŭ la esperantistoj M. Sváček kaj V. Srna pro agoj (celebrado de meso kaj helpado al celebrado de meso), kiuj apartenas al la fundamentaj homaj rajtoj laŭ la Universala Deklaracio kaj laŭ la du Internaciaj Paktoj, kiujn ratifikis ankaŭ Ĉeĥoslovakio kaj kiuj tial fariĝis parto de la interna juro de tiu lando. En la persekutoj aktive partoprenis funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (CEA), samtempe funkciuloj de UEA.

Ni ĵus ricevis la juĝon de la Distrikta Tribunalo en Ústí nad Orlicí, n-ro IT 29/79 de la 18-a de majo 1979, laŭ kiu M. Sváček estas kondamnita je la puno de malliberigo en la daŭro de dek kvin monatoj, kaj V. Srna je la puno de malliberigo en la daŭro de unu jaro kaj je la puno de malpermeso praktikadi la profesion de pastro dum tri jaroj. En ambaŭ kazoj la plenumo de la puno de malliberigo estas kondiĉa dum periodo de tri jaroj, kio signifas ke la juĝo ili ne perpetru (faru) alian «krimon».

Kvankam la akuzo, proceso kaj juĝo estas evidente kontraŭleĝaj, tamen la puno certgrade prezentigas kiel kompromiso inter la premioj de humanecaj, homrajtaj fortoj ekster Ĉeĥoslovakio (artikoloj en kelkaj Esperanto-periodaĵoj kaj en multaj nacilingvaj gazetoj), Amnestio Internacia, individuaj leteroj al ambasadoj de Ĉeĥoslovakio kaj la kontraŭleĝaj postuloj de la partio: severa «ekzempla» puno pro la partiaj postuloj, sed puno «kondiĉita» pro la humanecaj premioj. Estas notinde, ke jam antaŭ la juĝo Sváček estis eksigita el CEA kaj sekve el UEA (Srna verŝajne ne estis membro).

En la organoj de UEA neniam aperis kio ajn pri la juĝo kaj pri tiu tuta hontinda persekuto de du lojalaj kaj sinceraj esperantistoj, nek oni povas sciigi ĉu almenaŭ la Komitato de UEA estis informita pri ĝi. Tial oni ankaŭ ne povas ekscii ĉu eĉ tiajn agojn la Komitato rigardas konformaj al neŭtraleco laŭ art. 4 kaj 13 de la Statuto, formale ankoraŭ valida, aŭ ĉu la Komitato «restas kontenta» (verŝajne malbona traduko de la angla «satisfied»), ke CEA estas «vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro... religia sinteno», laŭ art. 13 de la plej lasta statutprojekto. Tamen, D-ro Tonkin kategorie asertas, ke la nuna gvidantaro agas «senvuale kaj maksimume honeste» (*Esperanto*, n-ro 10/79, p. 165). Ni lasas al la legantoj juĝi, ĉu estas tiel, aŭ la nuna gvidantaro kaŝas le veron sub la netravigebla vualo de ŝtala cenzuro por ne malplaĉi al partipolitikaj fortoj en UEA, agantaj laŭ la instrukcioj de la identaj partipolitikaj fortoj ekster UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 18.2.1 de Esperanto en Perspektivo.

34 NEŬTRALECO FORIGITA EL ART. 13 DE LA STATUTPROJEKTO

Sub la premo de nekontesteblaj faktoj pri la politikigo de UEA sub la posthamburga gvidantaro, la Komitato de UEA sentis sin devigita formale deklari en Rezoluzio de 1975, ke «la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en artikoloj 4 kaj 13 de ĝia Statuto ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigos la neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado» (*Esperanto*, n-ro 9/75, p. 142, *nia substreko*).

Ĉi, kiu legis la dokumentan materialon en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj poste en tiu ĉi rubriko de *Horizonto*, scias, ke tiu deklaro estis malvera en la momento, kiam ĝi estis farita, kaj restis tia. Tamen, almenaŭ formale la Komitato eksplicite promesis, ke art. 13 de la Statuto, kiu klare preskribas, ke nur Esperanto-Asocio «neŭtrala laŭ la senco de art. 4» povas aliĝi al UEA, restos valida. Efektive, kiel analizite en *Horizonto* 1/79 (p-oj 3-4), sen tiu esenca klaŭzo de art. 13, la principo de neŭtraleco formulita en art. 4 de la Statuto perdas ĉian senco. Nun la plej lasta statutprojekto ankaŭ formale forigis el art. 13 la kondiĉon pri neŭtraleco de la aliĝintaj asocioj. Tio estas kruda malobservo de propra promeso, sed, kiel dirite supre, laŭ D-ro Tonkin la nuna gvidantaro agas «senvuale kaj maksimume honeste».

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 18.2.1 de Esperanto en Perspektivo.

NOKTAJ EROJ DEL DESTINO

Hieraŭnokte.

Super ĝardengazono ŝvebis
pro herbkontuzo
sugestieto kvazaŭ spicodor.
Ni volis esti nur ekstere,
por senti la momenton en la simplo de ĉeesto.

Posttagmeze la hajlo formitralis la kontaktojn
de tig post tigo,
sed preter horo frakasita
ĉi somermildo —
eksterenigo fro familiaro de la lamp kaj libroj.
Elektro restis for
el ampolego stratangule,
kvankam lanterne elpendiĝis
oldĉina, kalma luno.

En tenebriĝo, en la simplo de ĉeesto,
kapjesis floraj kapuĉetoj.
Aŭdado kune
de noktobirdoj,
la pensoj ekkantantaj en ni
malgraŭ trafikomasoj.

La lumotraboj sur ŝose,
antaŭen en tenebron trudiĝemaj,
senĉesa flustro de la aŭtoj
dum ekĉeesto kaj forir.
Distanco. Kuroj senorbitaj neniejen,
aŭ ŝajne.

La vent krom brizo ekstermiĝis
hieraŭnokte.

Kurta marŝo tra kampkreskaĵoj ĝis la kansusur
kaj friska akvorando.
Frot-frotis la rosherboj kontraŭ maleoloj.
Tiam la praa renkontiĝ
en la simplo de ĉeesto.
Kveradis helokule ranoj, kototurtoj
kun kor humida — brulanta pro memoroj —,
himmante stelestingojn
kaj eternecon kiu estos,
ke plenumiĝu Lia volo.
La marĉ profundis per la temp kaj dormo.
Ho enplongiĝintaj, fosiliaj sonĝoj!

Transbrue ien,
tra spacetendoj nekonataj
forturbante, turniĝis
la tero,
kun eble galaksia centro
inter la tuta irintec kaj venontaĵoj.
Por ĉirkaŭporti jaran sortoŝarĝon:
ĉi mondopezaj
urbegoj, fumantaj fifabrikoj, farmoj ĉiun horon
survoje al la oriento kaj la suno,
tombejoj
kie sub luma frot kaj pluvofrapoj
la karno kun marmoro foreriĝas.

Por senti la momenton —
sed ho la distanco
kaj lampo febliganta
se vortoj en glorlibroj fine fremdas
post forfloriĝo per sezon de Romo!
Malgraŭ ke menso sur la Vatikankusen
vekigas inter la ruinoj kaj la luno,
kun rev ankoraŭ pri ĉefurbo de la mondo.
Dekkorna besto, la sepkapa,
morte vundita post jarmilo da regado.
Sed jam forpasis
promeso de la franka Karlo,
kaj frapis glavo el la doloriga nordo.
Ĉu venĝo de la Saksoj, fine,
la reveninta ve de ĉiuj triboj,
pro altrudita konvertiĝ?

Incenso kaj martirfetojoj
por sonĝ en dormo senripoza.
Laŭdkanto de la ranoj el la marĉo
kaj ĉiu diagrama fiŝ murdita,
kun sango kiu ree fluas trans la trabojn
pro benaj manoj etenditaj en tortur.

Ni konsideris do,
hieraŭnokte,
ĉu la latina trunko reviviĝos.

Ja estos plene kiel vidis la oldul,
kvankam fro ĉiu region krom Patmo
pri tio la memor
jam longe forbloviĝis, kiel ĉiu polv profeta.
Ankoraŭ super la prizoninsulo
la bestaj procesioj lume glitas
preter la ŝultron de antikva luno,
kaj ĉirkaŭringe laktaj
la ondoj plususpiras
per lacaj sulkoj kontraŭ rokoobstin.

En fina homprintempo,
antaŭ la mondrikolt,
radikoj apud Mediteraneo
la helajn sprosojn reverdiĝos kiel ŝaŭmon
sur ĉiu branĉo plufruktema,
kaj trans la teron ĝin etendos tute
por novaj verŝoj de la olda vino.
En reaj ebriigo kaj diboĉ
pokalon tenos la virin skarлата.
Kaj vino iĝos sango.

Ankoraŭ ne, hieraŭ ne
en la simpla de ĉeesto.

Planedo plunavigis tra la vasto
preter la turmentantajn revojn
de ekspluat kaj murdo
en ĉiuj mizerejoj de la mondo,
dum certa ideologi
en sektojn distaŭziĝis,
pro stultsufer
kaj nensolimoj de la historia homo.
Turniĝoj kiuj baldaŭ
ĉi provizorojn pon si lasos.
Ankoraŭ ne, nur baldaŭ.
Morgaŭiĝonte, feta penso sur kuseno kuŝis
kontraŭ la umbiliko del momento
kun okulfermo kaj palpebroj longaj.

Ho nur ekstere,
ni volis esti nur ekstere!

Ankoraŭ tuta urbo dormis domodise
en korpapuda varmo.
Kuŝadis antaŭ la okuloj de la Senripoza —
jarmilojn rigardinta —
tutaj popoloj sur la kurba mapo,
tra ĉiuj nuboj pluportate,
proksimaj al la centro del kvieto.
Turniĝis, turniĝis
la tero sub Potisto
kaj ardo de la sigelantaj steloj.
Forviŝo ĉiun noktomezon. Provizoroj.
Atendis la imagoj ekmuldotaj en la novan lumon
kiam la sun soriros.

Nepercepteblis, krom korfunde,
la Divizaĝo
ekformiĝinta
antaŭ ĉi dudek cent sekundoj
en niajn polvon kaj la trajtojn de sufero.
Ĝi atendadis, ie en
kaj preter
la tuta driv kaj historio —
kun mezo kien oni najlis korpon,
la speciale preparitan
kaj pli ol homan,
kel homo iĝu pli ol historia.

Jen inter amfeliĉ kaj sorto
ni trovis nin, hieraŭnokte,
tenate per la propraj brakoj,
ekstere en la simpla de ĉeesto.
Ni sentis la momenton.
Apude
kiriĝoj de la pretervastoj
kun galaksiaj kuroj
kaj interspaco del atomoj.
Ekstermuloj drakojn la Venonto, iam.

Trans bruoj,
al atendebla destinaĵo
kaj preter tion ankaŭ,
ien planedo forturniĝis
en noktaj duonbruoj kaj silento.

Ho senlimeco inter la sekundoj,
ke plenumiĝu Lia volo.

Edwin de Kock
17.2.1979

fro = ekde, disde, for de
pon = malantaŭ
sor = supren (Zamenhofa propono) en soriros

F E L I Ĉ O

«Knabino venu kun mi kaj vi renkontos la feliĉon» kriis li ofte al mi pasante malantaŭ porkaro kaj svingante sian longan vipon.

Marko estis la vilaĝa porkopaŝtisto. Ĉiam oni renkontis lin en bona humoro kaj li ne emis nur saluti preterpasantojn, sed ankaŭ aldoni kelkajn frazojn el sia riĉa konzervejo de spritaĵoj.

Li posedis ankaŭ teron kaj estis laŭ vilaĝa mezuro sufiĉe bonstata, sed li havis dungiton por la tera laboro. Porkopaŝtista profesio, kiu kutime estis ofico por tiuj, kiuj nenion posedas, estis por li reĝa okupo kun la diferenco, ke li volis regi super bestoj kaj tiel esti libera de homaj konfliktoj, problemoj kaj intrigoj.

La domo, en kiu li vivis kun siaj edzino kaj filino, estis deviga restadejo ne povanta kontentigi lian bezonon por vasta libera spaco en kiu li fajfis kune kun birdoj kaj diskutis kun siaj bestoj per lingvo kiun nur ili komprenis.

Tiun ĉi senton ne produktis la konduto de lia iom riproĉema edzino, kiu ofte kontraŭstaris lian liberan koncepton kvazaŭ li spitus al ĉio kio estas kutimo, regulo aŭ devigo. Kaj li ne sentis sin malkontenta en la domo pro tio ĉar lia surdeta filino revenis hejmen post malsukcesa edzeco. Ne, li estis indifera al ĉio, kio ne rilatis al lia sendependa vagado akompanata de porkaj gruntoj, en kiu li trovis kontentecon ekster la limo de la kutimaj konsideroj.

«Venu kun mi, knabino, kaj vi renkontos la feliĉon». La vortoj sonis en ŝerca tono, tamen mi akceptis ilin serioze. Mi ne komprenis la signifon de la vorto feliĉo. Ĉu mi estis feliĉa, aŭ ne, mi ne sciis.

«Kio estas la feliĉo, patro?» mi demandis.

«Feliĉo estas kontenteco en ni mem. Ne ĉiu ĝin akiras, sed tiu, kiu fariĝis kontenta, estas feliĉa.»

Mi ne komprenis la respondon, ĉar ĝi estis klarigita per komplikaj vortoj.

«Kio estas la feliĉo, najbarino?» mi demandis.

«Pri kio vi meditas, infano? Mi ne estas feliĉa, ĉar mia edzo drinkas kaj batas min, sed mi ne povas pro tio diri, ke mi estas malfeliĉa. Demandu vian patron, li estas saĝa homo.»

«Mi demandis, kaj mi ne komprenas, kion li diris.»

«Kial vi cerbumu pri ĝi? Nun vi estas feliĉa, sed nur poste vi konscios, ke vi estis feliĉa.»

Restis nur onklo Marko, kiu konas la sekreton. Kaj mi volis akompani lin.

«Ĉu mi povas iri kun onklo Marko en la arbaron?» mi petis la patrinnon.

«Jes, vi povas, sed vi devas ellitiĝi tre frue.»

«Onklo Marko, mi volas renkonti la

feliĉon; ĉu mi povas morgaŭ akompani vin?»

«Kompreneble, sed ne forgesu kunporti manĝaĵon, alie vi manĝos kun mi frititan lardon kun ajlo.»

Mi staris preta apud la domo. Antaŭ ni jam estis la porkaro, kiu iom post iom pligrandiĝis per aliaj lasitaj tra malfermitaj pordoj de la domoj, kiujn ni preterpasis.

Ĉiutaga matena eniro en la liberecon kaŭzis, ke la porkoj respektis la vipan ordonon de onklo Marko kaj kolektiĝis kun disciplina obeo gruntante saluton.

Estis aŭtuno kaj ni eniris la arbaron en ĝia kolorigita vestaĵo kaj dum la bestoj tuj poste okupiĝis pri la matenmanĝo de ĉie disŝutitaj glanoj, ni trovis restaĵon de subĉiela fajrujo en la loko, kie onklo Marko restos ĝis malapero de lasta glano kaj serĉos novan konservejon.

Li sternis kovrilon de ŝafa pelto, ekfumis sian pipon kaj dum la folioj faladis ĉirkaŭ ni, onklo Marko instruis min pri la nomoj de diversaj arboj kaj plantoj, kiujn ni observis de nia loko, aŭ ni promenis pli profunde en la arbaron por serĉi fungojn.

Mi pensis pri tia vivo kaj ne povis trovi la respondon demandante min mem, kion faras onklo Marco ĉi tie tagon post tago sola kun siaj porkoj kaj pipo.

Estis bela vetero en ĉi frua aŭtuno kaj sunajn radiojn ni povis konsumi veninte al la larĝa senarbejo, en kiu estis ankaŭ krucvojo en kvar direktoj.

Mi konkludis ke li certe ĉiutage renkontas la feliĉon kaj ke ili diskutas la tutan tempon. Mi ne povis imagi plenkreskulojn sen ilia eterna diskutado, al kiu mi alkitimiĝis, kaj vole nevole miajn problemojn mi solvadis kun mia interna mio. Mi ne kredis, ke ilin la maturaj personoj trovos interesaj.

Ni renkontis ankaŭ aliajn paŝtistojn, junulojn, kiujn mi bone konis. Kelkaj paŝtis siajn proprajn porkojn kaj kelkaj estis dungitoj ĉe tiuj, kiuj posedis porkaron. Ni eksidis sur kelkaj trunkoj kaj mi ludis kun ili la ludon kun tranĉilo, kiun oni per diversaj manaj movoj jetas alten por ke la klingo falu en molan teron.

Kiam la sonorilo de la vilaĝa preĝejo anoncis la tagmezon, ni disiĝis por tagmanĝi. La porkoj gruntis pro satiga kontenteco, larĝe disirinte ĉirkaŭ ni, kaj onklo Marko preparis pecetojn de lardo por rosti. Li akiris lignetojn kaj traboris la lardajn pecetojn, kies grasaj gutoj faladis sur ardaĵo ŝprucante kun bongusta odoro.

Mi kunportis panon kun mia plej bongusta delikataĵo — speciala kolbaso, kiun oni produktas nur en tiu ĉi provinco, sed larda odoro eniris miajn naztruojn kun la alloga deziro ankaŭ ĝin gustumi. Kvan-

kam onklo Marko sciis, ke ĝi ne estis mia porcio, li tamen opiniis, ke li devos oferi kelkajn pecetojn ankaŭ al mi. Kaj tion li kun ĝojo kaj fiero faris, ĉar li mem alte taksis sian sperton pri rostado. Sed ĉar li manĝis lardon kun akra ajlo kvazaŭ li manĝas pecetojn de frukto kaj kvankam mi ne ĝin toleris, mi volis konkuri kun li. Larmoj fluis de mia vizaĝo kaj mi havis senton, ke mia buŝo eksplodos. Fine mia vizaĝesprimo transformiĝis en maskon de hororo kaj mi kapitulacis.

Mia infana pacienco atingis la kulminon post tiel longa atendado kaj mi rezolute demandis:

«Onklo Marko, kiam ni renkontos la feliĉon?»

Li longe silentis, kvazaŭ li estus advokato serĉanta la plej konvinkajn vortojn por defendi la agon de sia kliento.

«Ni jam renkontis ĝin, infano, sed ĝi estas nevidebla, kaj staranta en nia proksimeco ĝi donas al ni kontentecon en diversaj formoj. Mi estas kontenta paŝti porkojn malproksime de ĉio, kion oni nomas kutima vivo kaj ĉi tie la feliĉo estas apud mi. Sed vi opinias, ke ĝin oni bezonas vidi. Kvankam ĝi prezentas al vi donacojn de sia abunda trezoro, senzorgan kaj sekuran vivon, bonajn gepatrojn, ĝojojn de ĉiutagaj travivaĵoj, en kiuj vi mem mastras la situacion, tamen vi volas renkonti ĝin kiel personon longe atenditan.»

Onklo Marko parolis saĝe kiel mia patro kaj pro tio mi ne komprenis lian klarigon. Sed mi ne intencis interrompi lin. Mi posedis mian propran opinion pri ĉionsciantaj plenkreskuloj kaj mian propran planon efektiviĝi ĉion, kio estas neefektivebla.

Ĉar dum mi esploradis la nekonatan mondon, en kiu regas ilia potenco, la ĉiopovantaj superuloj forlasi min antaŭ ol mi trovis la lumon de la scio al kiu strebis mia infana animo. Mi estis devigata fondi propran centron de informado, organizi kaj gvidi ĝin.

Mi legis fabelojn pri bonaj feinoj vagantaj nevideble tra la mondo kaj aperantaj subite kiel vivantaj estaĵoj por helpi bonajn homojn. Kaj ne dubante pri mia propra bono, spite de ĉiutagaj admonoj rilate mian temperamentan obstinon, nur fari tion, kion mi trovas ĝusta, mi supozis, ke la momento venis por anonci al bona feino mian bezonon pri ŝia helpo. Mi iros tute sola en la arbaron, ĉar onklo Marko informis min pri la ĝusta loko.

Kaj mi elektis unu el la dimanĉoj, en kiuj la paŝtistoj havas liberan tagon.

«Ĉu vi permesas al mi viziti Eva'n? demandis mi la patrino kun ruze diplomata mieno.

«Mi esperas, ke vi ne surgrimpos la plej altan arbon en via festa robo?», respondis mia patrino en dimanĉoserca humoro.

Eva loĝis ekster la vilaĝo, duonvoje inter la vilaĝo kaj la arbaro. Mi konis su-

fiĉe bone tiun ĉi arbaron. De sur ĝia randa spaco ni volis esplori ĝian enigman profundecon kaj en ĝi, la tuta klaso, vagadis kun mia patro, por ellerni praktike la botanikajn regulojn kaj la malsimpatian nomenklaturon. En ĝi ni plukis fungojn timante preni la venenajn. Ni estis satigitaj de bonodoraj kaj bongustaj fragoj kaj sukaj rubusoj. En ĝi ni serĉis insektajn ekzemplerojn por la lerneja kolekto. Vagante tra la arbaro mi ĉiam havis senton de io, kio restos al mi ĉiam nekonata, sed ĉiam rava.

Mi kaŝe ĉirkaŭiris la domon de Eva tiel, ke neniu el ĝi rimarku min kaj mi senĉese esploris la larĝan horizonton, por ke neniu eksciuj pri mia celo eniri sola la arbaron.

Mi konsideris, ke la ĉeesto de homo malebligos al mi renkonton kun feino kaj eĉ se mi kredus, ke ĝi estas produkto de mia infana fantazio, kial forviŝi tiun iluzion pere de kiu mi imagis esti iu esploristo, kiu volas pruvi la ekziston de la feliĉo?

Kiam mi elektis la lokon, kiun mi plej bone konis kaj el kiu mi povis trovi eliron, preskaŭ min ne timigis la soleco de tiu ĉi izotera azilo de feinoj. Tamen, kiam mi sidis sur iu arbotrunko, miaj okuloj senĉese cirkulis ĉirkaŭe por ke neniu embarasu min ŝultre.

La varma vento blovetis refreŝige, folioj faladis kaj zumante falis sur la jam pretan tavolon kaj kun ĉiu tiu kontinua palpado kiel uverturo de ekscitita revelacio, ĉio tio formis nevideblan framon. en kies centro mia infana estaĵo aspektis tiel mikroskopa, ke se feino ekzistus, ŝi ne rimarkus tian mizeran teridon. Sed ĉiuj tiuj flanke foraj pensoj ne rilatis kun mia propra certigo, ke nur mi estas centro en la grandioza naturo.

Mi jam malsatiĝis aŭdante la sonon de tagmeza sonorila tintado kaj mi ekmoviĝis kun la intenco trovi iun pli profundan lokon, kie neniu antaŭe enpaŝis. Kaj mi riskis la tutan pereigon, kvankam restis iu praktika rezono, en tiu ĉi danĝera entrepreno, marki la vojon per iu kruvcvoja linio aŭ iu forme rimarkebla arbo.

Jam tiam mi ricevis la unuan vivinstruccion, ke la entrepreno sen sufiĉa aŭ nur provizora sperto estas kondamnita fiaski. Ĉar mi trovis min tute perdita en tiu ĉi arbara vasteco en kiu unu arbaro eniras la alian kaj sterniĝas ĝis senfino.

Mi memoris la forgesitajn rimarkojn de plenkreskuloj, kiuj nun sonis tute alie en miaj oreloj, ke, se oni ne konas la arbarajn vojojn, oni neniam sukcesas reveni al la senarbara valo.

Krepusko kaj baldaŭ poste regos mallumo, kaj eĉ se mi trovos la vojon mi ne povas atingi la domon dumtage. Antaŭ mi jam image aperadis la strangajn formojn de la arboj, kiuj dumnokte aspektas kiel fantomoj aŭ demonaj vizioj vestitaj en karnevala robo kaj ili dancos antaŭ mi sian inferan dancon kun akompano de muziko, kiun komponas falanta

foliaro kaj kies mildaj dumtagaj tonoj transformiĝos en kriĉantajn sonojn de diabla orkestro.

Larmoj malsekigis mian vizaĝon kaj mia mieno estis senespera, ĉar mi konstatis, ke por renkonti la feliĉon, mi oferos mian propran vivon, antaŭ ol mi vidos ŝin por peti momentan helpon esti transportata sur ĝiaj larĝajflugiloj en la lulilon de mia gepatra ŝirmejo.

Kaj subite inter tiuj flekseblaj kolonoj disvice starantaj en linia vertikaleco aperis virino en nigra flikita vesto kun plenumano da sekaj branĉoj, kiujn ŝi kolektis por varmigi sian mizeran kabanon, sed por savi mian infanan iluzion tra miaj plorantaj okuloj mi vidis ŝin vestita en la robo de neĝe glata silko kun magia bastoneto en la mano, ŝin la bonan feĉnon, la feliĉon longe atenditan.

«Kion vi faras en tiu ĉi tempo en la arbaro tute sola, infano?» demandis ŝi kun maljuna tremanta voĉo, kiun miaj oreloj interpretis kiel sonon de anĝela kanto.

Mi ne kapablis tuj respondi. Mi troviĝis subite en tute alia mondo, kiun mi volis teni ĉiame por mi mem, ĉar en ĝi mi renkontis la feliĉon sopiratan de ĉiuj homoj.

«El kiu vilaĝo vi estas?»

Balbutante mi diris la nomon.

«Mia Dio, vi estas 8 km-ojn for de via vilaĝo.»

Tiuj ĉi vortoj indiferente sonis en miaj oreloj, mi faros ĉion laŭ ŝia ordono.

«Mi akompanos vin ĝis la loko, de kie vi facile trovos la vojon.»

Kaj sur la polva ŝoseo, kiu gvidis rekte al mia vilaĝo, ŝi adiaŭis min kaj subite malaperis ŝia feina figuro en la nokta mallumo la unuan kaj samtempe lastan fojon.

«Onklo Marko, mi renkontis la feliĉon.»

«Do, ne plu mi bezonas klarigi al vi kio estas la feliĉo, ĉu ne?»

Dum tuta mia lace vagabonda vivo mi sopiris ree renkonti ĝin, sed mia infana feino opinias, ke mi povas vivi sen projekto de ĝia magia bastoneto.

Z. Heide

SIMPOZIO DE ILEI EN PARIZO

En la Lingvistika Fakto de la Universitato René Descartes

(S O R B O N O)

Dum tri tagoj (18-20. oktobro 1979) okazis SIMPOZIO pri «Principaj kondiĉoj por la uzado de komuna eŭropa lingvo».

Al la salutvortoj de d-ro Mario Dazzini (ĝenerala sekretario de ILEI) kiel reprezentanto de la prezidanto Helmut Sonnabend (bedaŭrinde malsaniĝinta) respondis prof. Frédéric François, direktoro de la Lingvistika Fakto, interalie jene:

«Mi unue petas, ke vi ekskuzu min pro tio, ke mi parolas al vi franclingve, ĉar mi ne estas esperantisto. Mi estas tre feliĉa akcepti vin ĉi tie pro tio, ke Esperanto estas nuntempe ne nur io, kion oni instruas, sed ankaŭ io, pri kio oni emas pripensi...»

«Mi memorigas al vi ankaŭ, ke la lingvaj problemoj estas politikaj problemoj. Vi memoras ekzemple pri la problemoj de tiuj, kiu parolas nevastiĝintajn lingvojn en internacia kolokvo. Mi ne opinias dezirinda, ke nur du aŭ tri vastiĝintaj naciaj lingvoj — ĉu la angla, la rusa aŭ la ĉina? — estu la universalaj lingvoj, kaj mi pensas, ke vi donas la ekzemplon de interkonsentiĝo por havi lingvon, per kiu la homoj estu vere egalaj.»

Sub la alterna prezidado de Michel Duc Goninaz kaj André Albault prelegis pli ol dek personoj.

- Michel Duc Goninaz (Universitato de Aix-en-Provence) — «Kiu(j) lingvo(j) por kia Eŭropo?»
- Claude Piron (Universitato de Genevo) — «Justeco, efikeco, kultura riĉeco kaj lingva komunikado.»
- André Albault — «Dinamiko de la vortfarado.»
- François Lo Jacomo — «Universala lingvo por universala kunlaboro de matematikistoj.»
- Francisko Ruiz Zaragoza — «Kondiĉoj por rapida instruado de la lingvo en la lernejoj.»
- Stojan Djoudjef — «Lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj.»
- Marie-Thérèse Mas (Universitato de Nancy) — «Avantaĝoj de la Lingvo Internacia en sistemo por aŭtomata rekono de la parolo.»
- Helmar Frank (Cibernetika Instituto de Paderborn) — «Eco kaj pedagogia valoro de la lingvo-orientiga instruado.»
- Francisko Anton Sanchez — «Didaktikaj kriterioj rilataj al la Lingvo Internacia.»
- Miodrag Stojanovic — «Esperanto kaj la klasikaj lingvoj latina, greka.»
- Serenella Gioacchino Terruzzi kaj Marina Michelotti — «Esperanto, ilo de komunikado kaj unuigo inter la popoloj.»

— John B. A. Nyssen (Fondaĵo de Aplikata Lingvistiko en Hago) — «*La usoneca kaj briteca anglaj lingvoj por scienco.*»

La SIMPOZIO finiĝis per jena dezir-esprimo:
La partoprenintoj de la Simpozio «Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia-eŭropa lingvo», okazinta en la Universitato René Descartes (Sorbono - Parizo) inter la 18-a kaj la 20-a de oktobro 1979, priesplorinte kaj pridiskutinte la nunan staton kaj estontajn perspektivojn de la interlingva problemaro,

konstatis

ke la intensigon de internaciaj kontaktoj kaj la normalajn interrilatojn de homoj parolantaj diversajn lingvojn ĉiam pli akre malhelpas la manko de komuna lingvo, ke tiun rolon povas plenumi nur politike neŭtrala, facile alproprigebla internacia lingvo, kaj ke la internacia lingvo Esperanto dum sia pli ol naŭdek-jara vivo perfekte pruvis sian taŭgecon en ĉiuj funkcioj postulataj de tia lingvo;

proponas

al UNESKO renovigi siajn konstatojn kaj proponojn formulitajn dum la Ĝenerala Asembleo okazinta en la jaro 1954 en Montevideo;
al la EUROPA PARLAMENTO meti sur la tagordon de sia venonta Asembleo la temon pri la komuna Eŭropa Interlingvo, kaj komisiu al speciala faka komisiono prilabori deklaran perspektivan planon pri la solvo de la problemo.
La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj posedas riĉan eksperimentan materialon, kiun ĝi povas liveri al la organizota komisiono kaj ĉi-cele ĝi mem proponas siajn servojn.

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Al la Redakcio de HORIZONTO,
Zaragoza.

Estimata Redaktorino,

Ni petas vin publikigi la suban leteron:

En la n-ro 9 de julio-oktobro 1979 de la gazeteto *Verda Informilo*, presata en Ateno, iu anonima «S.S.» publikigis komenton pri la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado sub la titolo «La redakcio opinias». Fakte, ĝia enhavo estas nenio alia ol paskvilo kontraŭ la neŭtrala Esperanto-Movado kaj precipe kontraŭ Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝia ĉefa idea batalanto kaj antaŭa prezidanto de UEA, kiel ankaŭ kontraŭ la graveco de la 5-a Konferenco, okazinta en Ateno la pasintan septembron.

La paskvilo, en kiu troviĝas amaso da plej ordinaraj malveroj kaj insultaj esprimoj, miksitaj kun hipokritaj laŭdoj de la «nobla Esperanto-idealo», k.s., pretendas, ke la hamburgaj eventoj tutsimple ne ekzistas kaj ke UEA plu estas «neŭtrala». La aŭtoro intence kaj sisteme ignoras la plej elementajn faktojn kaj verojn, prezentitajn en multaj dokumentoj, ĉefe en la historia verko *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en la revuo *Horizonto*. Tiaj publikaĵoj, kiuj atakas per kalumnioj kaj mensogoj la reputacion de personoj, kiuj pleje elstarigis en la batalo por Esperanto, estas malakcepteblaj en nia «greka spaco» kaj ĝi estas sen precedenco en nia lando, sendepende de loko kaj tempo, fare de kiu ajn greko.

Ĉar gravas hodiaŭ, antaŭ ĉio alia, la rigora observado de la fundamentaj principoj de esperantismo, fiksitaj de Zamenhof mem kaj de la postaj ĉeflaborantoj por la lingvo (en kiuj fajrumas humanecaj ideoj), la supraĵ vortoj estu sufiĉa respondo al lia paskvilo, aparte al ĝia punkto «oni devus ne okupi sin pri tia afero...». Certe la anonima aŭtoro ne estas kapabla sin okupi pri gravegaj problemoj de la Esperanto-Movado.

Ateno, la 1-an de decembro 1979.

Kun varmaj salutoj

Por la Greka Agadgrupo de N.E.M.

Adda Sakellaropoulou, dentkuracistino
Georgo Griniatsos, advokato
Natasia Biniari, pentristino
Barbara Pulidu, oficistino
Despina Papadopulu, flegistino

Kostas Koliopoulos, d-ro inĝeniero
Keti Diamanti, filologo
Helena Vamvakidu, gvidantino turista
Maria Luka, komercistino
Anna Adreatu, komercistino

AL ARTIKOLO DE "L'HUMANITÉ" RESPONDAS WILLIAM GILBERT

«En *l'Huma* de la 19/10/79 aperis artikolo subskribita Pierre Crépel sub la titolo: «Por lingva pluraleco». Mi volas substreki, ke ankaŭ ni kontraŭstaras la alprenon de unika lingvo kaj pli aparte de la angla pro la samaj kaŭzoj kiel P. Crépel.

Kion ni ne ĉesas ripeti, tio estas, ke la uzado de naciaj lingvoj povas solvi la prikomunikadan problemon nur laŭ maniero tre limigita konsidere la bezonojn de nia epoko kaj diskriminacia. Diskriminacia ĉar ĝi ĉiam favoros intelektan eliton, la plej potencajn naciojn kaj la registarajn kaj neregistarajn organizojn sufiĉe riĉajn por pagi al si la lukson de tradukservoj pli kaj pli kompleksaj kaj multtekostaj.

Ni advokatas konsekvence por unu lingvo vehikla, *komuna* kaj ne *unika*, neŭtrala, planizita, lernebla de ĉiuj. Tia lingvo ne povas havi la pretendon *ebliĝi* la kompreniĝon inter la popoloj, sed ĝi povas — kial ne? — almenaŭ *kontribui* en ĝi. Kaj ĉiamaniere ĝi respondas al bezono de nia tempo.»

William Gilbert — prezidanto de la «Fédération Espérantiste du Travail»².

Oni notos la koincidon, ke necesis atendi la jaron 1974 kaj la aliĝon de G.D.R. kaj Soveta Bloko, por ke Esperanto en Francio estu oficiale transprenita de respondeculo de la Partio. El tio sekvis, ke de tiam ĉiujare en la festo de «L'Humanité» la «Fédération Espérantiste du Travail» estas menciita kiel «*kultura demokratia asocio*» (Vidi: «L'Humanité-Dimanche»).

Notinde, ke la stabo de F.E.T., kiu cetere ne kaŝas siajn politikajn intencojn, animas la Mondpacan Esperantistan Movadon, M.E.M.; kaj oni pretere notos, ke la numero Julio-Aŭgusto de 1979 de «Franca Esperantisto»³ larĝe donis lokon al tiu komunista organizo sendube laŭ la «nova vento» blovanta el Oriento. Jen al kio kondukas ĉia komplezo!...

Kion opinias pri tio la nova prezidanto de U.F.E. laŭdire tre «*dinamika*»?⁴...

J. T.

¹ Sub la titolo «Unu komuna lingvo» kaj en la rubriko «En toute franchise» (Tute malkaŝe) de la taggazeto «L'Humanité», organo de la Franca Komunista Partio (numero de la 31. oktobro 1979).

² Federacio de la Esperantistaj Laboristoj — La tekstaj kursivoj estas originalaj.

³ Oficiala organo de Unuiĝo Franca por Esperanto (franca branĉo de U.E.A.).

⁴ Propra artikolo lia temas pri dinamiko kaj ne dinamito.

DANKESPRIMO

Reveninte al Romo post longa foresto, mi trovis salutkarton el Ateno kun pluraj subskriboj de partoprenintoj en la Konferenco de N.E.M.

Pro neebleco respondi rekte al ĉiuj afablaj subskribintoj, mi adresas al ili mian dankon pere de «Horizonto».

Carolină Minnaja

NI KONDOLENCAS

Kun profunda bedaŭro, ni ĵus informiĝis pri la forpaso de nia samideano kaj amiko

D-ro Josef Eduard Ambroz

Sindona esperantisto tre aktivis en la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), li ĉiam estis preta helpi kaj kunlabori per interŝanĝo de spertoj. Pri tio ni havas bonan pruvon, de kiam en la jaro 1964, esperantistoj de Zaragoza kontaktis kun li unufoje, pro profesiaj aferoj. — Fervora esperantisto, li ĉiam restis fidela al la Zamhohofa idealo.

Ke li pace ripozu!

Por lia familio, nian sinceran kondolencon.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

XVIII-AJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ.
Tortosa. Eld. Eldona fako de HEF.
Zaragoza 1979. Diversaj aŭtoroj. 80 p.
18 × 12 cm.

Estas ĉe krita momento, nome: la dekadenco de la provenca literaturo, kiam naskiĝas la Floraj Ludoj (FL). Baldaŭ ĝiaj famo kaj efiko montriĝis tiaj, ke Juan la I-a de Aragon ekstarigas La Ludojn en Barcelono, kreante paralele por ĝia plifortigo la «Consistori del Gay saber» en la jaro 1363. Tamen, estas en 1859 kiam la F. L. ekviglas en la kataluna ĉefurbo, kun certa speciala signifo, kiun Francisco de P. Canalejas tre bone reliefigas dirante, ke ili ne estas nuraj literaturaj konkuroj, kaj eĉ ne sole la klopodo aperti pli larĝajn horizontojn al la inspiro poetika, sed unue kaj plej grave, la F. L. estas ia subteno kaj stimulo de la kataluna lingvo. La rezultoj montriĝis eksterordinare bonaj, do, ne mirigas nin, ke kontakita de la priparolita sento, estas nepre kataluno, Frederic Pujulá i Vallés, kiu okaze de la V-a Universala Kongreso en Barcelono, iniciatas la F. L. ĉe la movado.

La paraleleco inter la bezonoj de la kataluna lingvo kaj E-o estas facile rekoncible, kaj la kontribuo de la F. L. al la potenco de ambaŭ lingvoj nediskuteblas, ĉar ne kontestebla estas la fakto, ke viva lingvo devas fronti ĉiajn kondiĉojn, en batalo ĉe kiu la uzantoj de tiu lingvo trovu la plej taŭgajn solvojn por ĉiu cirkonstanco; kaj ankaŭ ŝajnas ĉies agnoskita la fakto, ke la poezio estas unu el la plej gravaj vivigaj faktoroj en la disvolvigo de la internacia lingvo. Nu, kune kun aliaj proviloj, la F. L. aldonis ja etoson kaj karakteron al la E-a literaturo.

Kaj jen, 42-jara silentado rompiĝis, kiam la Internaciaj Floraj Ludoj (I. F. L.) ree eĥis esperante okaze de la 20-a kataluna renkontiĝo en Tortosa, 1978. La grava evento ne meritis malpli ol ĉi libron, kiu respegulas fidele, laŭlonge de okdek paĝoj, la denove vivan ĉeeston inter ni de la I. F. L.

La ekstera aspekto de la libro povas ŝajni modesta, eble pro la griza koloro de la kovrilpaĝa foto, sed interne la tuto impresas lukse laŭ presado kaj papero. La konstruo de la libro en diversaj fakoj

estas tre bona kaj preseraroj ne troveblas.

Pri la enhavo, ne ŝajnas dece opinii rilate la premiitajn verkojn, ĉar mi ja ne konas la mezajn kvaliton de l'aliaj konkursaĵoj; tamen, la nomoj de la laureatoj povas esti sufiĉa garantio de alta kvalito: Kris Long, Simeono M. Simeonov, Lina Gabrielli, Bernard Golden, kaj aliaj subpremiitoj.

Do, entute, libro havinda ne nur por poeziamuloj, sed por ĉiuj ĝenerale, ĉar interalie ĝi ankaŭ entenas premiitajn prozaĵojn kaj interesan festparoladon de S-ro Manuel Casanoves, prezidanto de la juĝa komisiono.

Por mia persona gusto, mi trovas en la libro nur unu eta manko; kial ĝi ne aperis iom pli dika, entenante la premiojn de la I-aj I. F. L.? Tio ja donintus interesan bildon pri la ŝanĝoj okazintaj intertempe en nia literaturo.

Liven Dek

—oOo—

FERIO EN REALO, Wallace Stevens, el la angla tradukis Kris Long. 52 paĝoj, 15 × 11, Eldonis Kris Long, Bracknell, 1979.

La esperantlingva poezio, ek de ĝia unua poeto L. L. Zamenhof, aŭ pli bone, ek de Grabowski, evoluadis tre malrapide: kvazaŭ oni volus ĵaluze gardi forvaporigantan aromon de tradicio. Ne nur pri skemoj, sed precipe pri sintakso, pri teĥniko kaj, ankaŭ, pri ideoj kaj konceptoj tro striktaj.

Lastatempe, novaj generacioj de poetoj, eble ne tiel abundaj kiel antaŭe, envenantaj kun novaj kaj nekonvenciaj mesaĝoj kaj manieroj manipuli la lingvon, abrupte rompis la primitivajn modlilojn, same kiel faris jam multe pli antaŭe elstaraj naciaj poetoj en sia propra lingvo. Tio, sendube, reprezentas, ankaŭ nun, ŝokon kiu skandalas kelkajn fidelajn poeziamantojn!

Ankaŭ pri la traduka kapablo de Esperanto, novaj teĥnikoj envenis, sed, ne por detronigi la objektivan aŭ klasikan manieron kiun kreis en pli moderna epoko, por ekzemplo, Jaume Grau Casas aŭ Kalocsay per sia tre persona nekomparebla jonglado pri altranga rekreado.

Legante la libron «Ferio en realo» kiu konsistas el diversepokaj poeziaĵoj de Wallace Stevens (1879-1955), mi plifirmiĝas en tiu opinio. Certe, laŭ mia aprezado, io nova troviĝas inter miaj manoj kaj sub miaj avidaj okuloj kaj poezisenta perceptado. Ĉu mi devas honti dirante ke mi neniam lernis la anglan, kaj ke mi ne memoras esti leginta antaŭe eĉ unu solan tradukitan version de tiu grava aŭtoro? Nur pasintjare (ĉu mi vere devas, nun, honti pri tio?) mi legis la unuan versaĵon de la poeto kaj tradukisto Kris Long, pro la fakto ke mi estis el la Juĝa Konsistorio de la 18-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kies Naturan Floron li meritplene gajnis. Ĉu mi, do, rajtas recenzi (precipe pri la fakto ke mi ne scias la anglan) tiun gravan sed modeste prezentitan poemlibron? Tamen, mi ĝin provas recenzi, kvazaŭ ĝi estus originala verko. Ĉu tio validas? Laŭ mi, iomete: ĉar la karakteriza stilo de Kris Long — de kiam li verkas originale — manifestiĝas same en ĉiu tradukita versaĵo de «Ferio en realo».

Wallace Stevens uzas abunde abstraktajn rimedojn por poezigi siajn sentimontojn kaj la konceptojn pri la homa eferveska vivo. La tasko traduki tian poezion, supozeble, ne povas esti alia ol serioza kaj riska ekzercado. Se la versa sintakso de Kris Long aspektas, ordinare, kiel iom heterodoksa, tiel, kaj plie, manifestiĝas abunde en tiu tradukado, kune kun la genia aŭ kuraĝa aplikado aŭ kreado de kunmetitaj vortoj kaj uzo de tiuj simplaj, kiuj alprenas sencon, aŭ ŝarĝon, transcendan kaj atutan:

«Sed ludu, nepre / muzikon trans ni, tamen ni, / muzikon por la blua gitaro / pri tio, kio tiel estas» (paĝ. 24). «Flugilojn dis al pluvo, neĝo, / trafi la vivan hej kaj ho, / tiki ĝin, taki, turni vere, / bati ĝin el sovaĝa bluo, / klak-tintigante kord-metalon...» (paĝ. 25). «Homanas / kirl-bruo ŝrumpus fine ĝis / spirado de viglanto nokte» (paĝ. 30). «Birdoj, kiuj alondis malpura-akve, / super rokoj flugante, tra la ĉielo, / kvazaŭ portataj de l'ĉielo flue, / sternataj onde, plate sur la bordon, / ondoj sinsekve nud-lavantaj mondojn» (paĝ. 45). Ktp.

Konstateble, la libro estas profunda laŭ ĝia poezia gravedeco kaj esperanta lingvaĵo. La plimulto de la tradukrimedoj donas rezultaton vere brilant: «Jonkvilojn tra l' hararoj de italinoj / rimarkis antaŭlonge la seraf' en / rubandoj de l' patrinoj, kaj rerimarkus. / Abeloj bruas, kvazaŭ nek abeloj / nek ĥiacintoj estus for. Ni diras, / ke tio aŭ tio ŝanĝiĝas» (paĝ. 63). La poemaro prezentiĝas laŭ enhavo iom hermetika, pro fideleco, supozeble, al la anglalingva enhavo. Kaj Humprey Tonkin tradukis unu poemon el la kolekto, kun vere laŭdinda stilo kaj perfekteco.

La esperantlingva poezio jam transcendis definitive sian genezan mondon.

G. Mora

FERVOJA LEKSIKONO franca-esperanta kun indekso en esperanto — de André Blondeaux — eldonita de la franca fervojista asocio F.F.E.A.

Ĉu vi konas jenajn esprimojn: «*Duvoja trakforko livabranĉa, dekstrabranĉa, aŭ simetria*» — «*Trivoja trakforko kun unua branĉo liva kaj dua branĉo dekstra*» — «*Simpla frogajo*» — «*Oblikva, simpleliga aŭ duobleliga trakokrucaĵo*»?

Jen nova riĉiĝo de la teknika lingvo en Esperanto: post pli-ol-25-jara laboro A. Blondeaux kompilis teknikajn esprimojn de la fervojo laŭ la ĝenerala leksikono de Fervoja Internacia Unuiĝo.

En nia jarcento, kiam tiel gravas la teknikaj terminoj en ĉiuj lingvoj, ĉi tiu nova leksikono estas plia paŝo antaŭen por la Lingvo Internacia: krom strikte teknikaj vortoj kiel ĉi-supre utilaj ne nur al profesiuloj sed ankaŭ al amatoroj de et-modeloj, enestas ankaŭ multe da simplaj parolturnoj interesaj por la fervojaj uzantoj, ekzemple: «*fenestro - kun fiksa glaco - kun ŝovebla glaco - kun glaco levefermebla - kun glaco duone-malfermebla*»; «*bileto - rondvetura - duon-tarifa - dimanĉa - infan(-tarif)a - falsita - famili(o-tarif)a - semajnofina - kolektiva - internacia - kun fiksa itinero - soldat(o-tarif)a - liberdata - eksvalida - plentarifita - turist(o-tarif)a - jarferia*»; «*sidlok, dorm-, ambulanc-, trinkej-, bufed-, kuŝ- aŭ benklita, lit-, restoraci- (kun memserva bufedo), salon-vagono*»; k.t.p.

Kompreneble kelkaj esprimoj inspiras aliajn pli bonajn. Eĉ foje montriĝas en la leksikono ia hezito de la uzado inter pluraj dirmanieroj: «*kontraŭnebulaj reflektorlampoj aŭ -lumoj (= lumĵetiloj)*». Eĉ eble preferindus la pli simpla kaj logika vortigo: tranebulaj lumiloj, ĉar la efikeco de la lumo vidigas pli ĝuste «tra» ol «kontraŭ» nebulo kaj «reflektor» fine datiĝas de la kandela lampo! Sed ne gravas: ĉi tiu gratulinda kompilaĵo de André Blondeaux estas baza ŝtono, sur kiu perfekte iĝas la uzado. «Ni fosu nian sulkon!»

Jean Thierry

—oOo—

VICTOR LEBRUN: Leo Tolstoj, la homo, la verkisto kaj la reformisto. Plejado, Beletra Eldonserio 10, Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno (Italujo) 1978. Broŝurita, 402 paĝoj, XXIII fotografaĵoj ekster la teksto.

Victor Lebrun (1882 en Parizo - 1979 en Le Puy Sainte Reparde) tre frue venis en Rusujon, kie li vivis de 1887 ĝis 1927. Kiel junulo li kontaktiĝis kun la fama Rusa verkisto, baldaŭ fariĝis ties helpanto kaj sekretario. La rilaton nur interrompis la morto de Tolstoj en 1910. Sed ties spiritan sigelon Victor Lebrun portis plu.

La libro konforme estas dunarta: antaŭ kaj post la morto de Leo Nikolaido. La unua parto temas pri la juneco de Victor Lebrun, pri lia aktiveco ĉe Tolstoj en

Jasnaja Poljana kaj enhavas multegajn valorajn sciigojn pri Tolstojo, rimarkojn kaj intimajn observaĵojn de elstara graveco laŭ biografiaj kaj psikologiaj vidpunktoj. Estante neniu sciencisto, okupanta sin pri Tolstojo, povos malatenti ĉi tiun libron. Ĝi estas unuaranga fonto pri la vivo de la granda Rusa pensulo, kies influo, kvankam ne plu tiel aktuala kiel dum la tempo de lia vivo, tamen neniam ĉesis ĝis hodiaŭ.

Victor Lebrun detale referas pri siaj interparoladoj kun Tolstojo, kies temoj ofte estis problemoj profunde homecaj kaj religie moralaj. Multaj leteroj el la korespondado inter Lebrun kaj Leo Nikolaido, kromaj valoraj dokumentoj, interrompas kaj substrekas la eldirojn de la teksto. Ni sciigas multon pri la labortago kaj pri la laborkutimoj de la tiam jam tre maljuna majstro, pri la malfacilaĵoj de ties ekzistado, ĉiam minacata de la cara reĝimo, ĉiam denove tragikigata de liaj familiaj cirkonstancoj. Lebrun montras Tolstojn kiel homon, kiu admirinde strebas realigi siajn altajn Kristanajn, sed tute maldogmajn etikajn konceptojn en la ĉiutaga vivo malgraŭ la grava konflikto, kiun prezentis por li la kunvivado kun sia nekomprenebla edzino. Ĉio ĉi tio nun speguligas en vere sendependa analizema spirito. Kvankam Lebrun tiam estis ankoraŭ juna, eĉ tre juna homo, kaj kvankam la influo de la potenca personeco de Tolstojo sur lin estis granda, li tamen neniam fariĝis blinda kaj senkondiĉa admiranto de Tolstojo. Estas nun tre interese legi, kiel li mense kreskas per la senpera kontakto kun la maljuna saĝulo, kiel li spirite evoluas kaj tamen ne perdas sian kritikan sendependecon. Per tiu unua parto de la libro ni ekvidas kvazaŭ per tempa teleskopo la kreinton de REVIVIGO. Ni imagu la tempajn distancojn: Lebrun konatiĝis kun Tolstojo persone en 1900, Tolstojo mortis en 1910, nur ĉirkaŭ duonan jarcenton poste Lebrun skribis siajn memoraĵojn, kaj nur post plia kvarona jarcento li trovis sufiĉe kuraĝan eldonistinon por aperigi ilin.

Se la unua parto de la libro estas de speciala intereso por ĉiu, kiu iam legis ion ajn de Tolstoj aŭ iel okupis sin pri tiu verkisto, la dua parto koncernas precipe tiujn legantojn, al kiuj gravas la destino de la homaro sur nia planedo. Ĝi multe pli malkaŝas pri Victor Lebrun

mem ol pri Leo Nikolaido. Victor Lebrun fariĝas kvazaŭ paroltubo de la morta romanisto. Estas ĉi ties ideoj, kiujn li tradicias, sed ili estas modifitaj laŭ la temperamento de la disĉiplo kaj, pli grave, laŭ la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj de la hodiaŭa mondo. Ili tamen funde restis la samaj. Ili ja estas la ĉiamaj demandoj de la homa ekzistado, de la moralista pensulo pri la plej bona vivkonduco, pri la vivmaniero, kiu plej bone plaĉas al Dio. Sed Dio ĉi tie ne signifas ia mita enĉiela personeco, temas pri la krea energio de la kosmo mem. Kaj tiurilate Victor Lebrun provigas kiel surprize moderna pensulo, kies idearo konformas al multaj biologiaj kaj sociologiaj ekkonoj de nia tempo. Li nete montras sin kiel evoluciiston, kaj kiel tia li havas multon por diri al ni samtempuloj pri problemoj de nia vivo, ĉu individua, ĉu socia. La scivola atenta leganto povas ĉerpi salutindajn riĉaĵojn el tiu libro de ne nur klare pensanta, sed ankaŭ precipe saĝa maljunulo.

Ni Esperantistoj bonvolu ankaŭ ne forgesi, ke Tolstojo estis unu el la unuaj fame konataj personoj, kiu rekomendis Esperanton. (Oni komparu: Isaj Dwatrer, PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ.) Krome legos ĉi tiun libron kun plezuro ankaŭ ĉiu, kiu konas la belan eseon de Tomaso Mano pri «Goethe und Tolstoi» en «Adel des Geistes».

Rikardo Sulco, FR Germanio

—oOo—

SARKASME KAJ ENTUZIASME. de Miyamoto masao. Eldonis: «La Kritikanto» (nova eldonejo), 152 paĝoj, formato 15 × 20,5 cm. Prezo: 18,— gld / 9,— dol. Distribuas la libron, ankaŭ al revendistoj, Japana Esperanto-Librokooperativo.

—oOo—

NINOS (Infanoj). Broŝuro eldonita de Amnestio Internacia, en la Internacia Jaro de la Infanoj, 1979. — Ĝi estas tre interesa publikaĵo bone prezentita, originale publikita en la angla lingvo. (Amnesty International Publications, 10 Southampton Street, Londono WC2E 7HF, Britujo.)


SPECIALA NOVJARA DONACO AL «HORIZONTO»

La 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado aprobis la proponon de Prof. Dro. Ivo Lapenna prezenti al «Horizonto» specialan novjaran donacon kiel signon de rekonon pro la pozitiva rolo, kiun la revuo ludas en la nuntempa Esperanto-Movado, kaj por certigi ĝian pluan regulan aperadon. Jen la nomoj de la donacintoj:

Ĝis nuna sumo	78.462 pesetoj
Ges-roj Thierry	7.727 »
Ges-Becker	5.053 »
	<hr/>
	91.242 »

LA VI.^a KONFERENCO EN STRASBURGO!

Enirejo de la Katedralo
(detalo)



La Franca Agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado oficiale invitis la VI-an Internacian Konferencon de N.E.M. La Konferenco okazos en Strasburgo, Francujo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980.

N.E.M. estas tre feliĉa pro tiu invito, ĉar la urbo Strasburgo estas eksterordinare interesa kiel eŭropa centro, ja sidejo de multaj instancoj kie ĉiutage — se ne ĉiuhore — sentigas la problemoj de multlingveco. Precipe rilate unu temon de la Konferenco la elekto estas aparte konvena.

Strasburgo, ĉefurbo de Alsaco, estas bela, ĉarma kaj agrabla urbo. El turista vidpunkto ĝi estas aparte alloga. Renkontigas tie pasinteco kaj moderna tempo. La malnova urbocentro, la katedralo — el arkitektura kaj arta vidpunktoj unika — kaj la kastelo Rohan, kie kelkfoje okazas subĉielaj prezentadoj, havas eventoplenan historion. Aliflanke, oni trovas modernegajn konstruaĵojn kiel la Palacon de Muziko kaj Kongresoj, la Palacon de Eŭropo kaj, en la kvartalo «Esplanade» la novajn konstruaĵojn de la Universitato — por mencii nur kelkajn detalojn.

La urbo situas sur la bordo de la plej grava arterio de la okcident-eŭropa ŝiptrafiko, la multe prikantata riverego Rejno, dum trafluas ĝin la rivero Ill. Ĉirkaŭas ĝin la pitoreska kaj floroplena alsaca ebenaĵo kun sia varia pejzaĵo. La popolo alsaca estas gaja, afabla kaj helpema. Ĝi kutimas akceptadi vizitantojn el la tuta mondo.

La programo de la Konferenco enhavas la jenajn du ĉeftemojn: «*Lingvodiverseco kiel obstaklo al kreo de eŭropa konscio*» kaj «*La stato de la Esperanto-movado en 1980 kaj la rolo de N.E.M.*» Kompetentaj prelegontoj estas invititaj enkonduki tiujn temojn kaj viglaj diskutoj estas antaŭviditaj. Plue, en ĝeneralaj kunvenoj oni pridiskutos la revuon «Horizonto» — fakte unu el la plej belaj eldonaĵoj aperantaj en la hodiaŭa Esperantomovado — kaj oni kompilos konkludan rezolucion de la Konferenco, dum oni povos libere pridiskuti aliajn aktualajn temojn surtabligotajn.

Aliaj konferencaj programeroj estos vizito al la Palaco de Eŭropo, detala veturo tra Strasburgo kun klarigoj en Esperanto, tutaga ekskurso tra la belega regiono de Altaj Vogezoj kun tagmanĝo en tiea alloga restoracio kaj vespermanĝo malpeza en tipa vilaĝo proksima al Strasburgo. Pro la somera horŝanĝo oni povos ja ankaŭ vespere ĝui la mirindan naturon je taga lumo. Bankedo en restoracio sur bordo de la rivero Rejno kun bela panoramo super ĝi kaj parko apude, kaj krome diversaj distraĵoj kompletigas la programon.

La Konferenco okazos en moderna Konferencejo. Ankaŭ loĝado kaj manĝado okazos tie, kio multe kontribuos al agrabla kaj amika kunestado kaj evitas temporaban veturadon inter Konferenco kaj hoteloj.

Ne nur tiuj, kiuj jam unu aŭ plurajn antaŭajn Konferencojn partoprenis estas varme invititaj kaj kun fido atendataj. Kore bonvena estos ĉiu sincera esperantisto kiu sen antaŭjuĝoj deziras rekte el la fonto aŭdi pri la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj pri la kialo de ĝia ekzisto, por povi mem poste juĝi objektivite kaj sendepende. Ĉiuj povos partopreni la diskutojn.

Rapida aliĝo helpas la organizan komitaton kaj estas en ĉies intereso. Neniu hezitu kapti la okazon viziti la sidejon de la unua rekte elektita Eŭropa Parlamento! Aliĝilojn kaj informojn oni petu de la konstanta adreso de la Konferenco: S-ino M. Muller, 80 Bd. Clemenceau, F 67000 Strasbourg, Francujo.

prez. Loka Organiza Komitato
M. Muller

KIO ESTAS KAJ KION CELAS N. E. M.

(Teksto komisiita de la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Ateno en septembro 1979)

- Negativaj sekvoj de Hamburgo.* — La konataj hamburgaj eventoj de 1974, grandparte kaj esence inspiritaj de ekstermovadaj politikaj fortoj, kiel pruvite en la verko *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en *Horizonto*, kaŭzis ke la gvidantaro de la iam politike neŭtrala kaj sendependa U.E.A. venis sub fortan influon kaj daŭre kreskantan premon de partipolitikaj Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj, agantaj en U.E.A. laŭ la ĝeneralaj direktivoj aŭ rektaj instrukcioj *de partipolitikaj faktoroj ekster la Esperanto-Movado*.

Tio perdis al U.E.A. la neŭtralecon, kaj sendependecon, do la du esencaj antaŭkondiĉojn por efika agado en ĉiuj sociaj medioj. Tio, siavice, interne malfortigis la Asocion, kiun post Hamburgo forlasis pli ol unu kvinono de la individuaj membroj, inter kiuj multaj tre valoraj aktivuloj. Ne estas surprize, ke ekde 1974 U.E.A. grave malprogresis sur ĉiuj linioj, kiel klare vidiĝas el la Estraraj Raportoj, malgraŭ la unike favoraj eksteraj cirkonstancoj.
- Kial N.E.M.?* — La politika kompromitiĝo de U.E.A. pro la evidente partipolitikaj programoj kaj agadoj de granda parto de ĝiaj «landaj asocioj» (fakte partipolitikaj organizaĵoj aŭ instancoj), kaj sekve de iliaj komitatoj en U.E.A., kaj pro la pasiveco de la alia parto rilate tiujn partipolitikajn aktivadojn, necesigis la daŭrigon de la tradicia partipolitike kaj religie neŭtrala zamenhofa Esperantismo, inspirita de humaneca internaciismo, pere de la Neŭtrala Esperanto-Movado (N.E.M.). Ne estas, do, N.E.M., kiu kaŭzis la nunan profundan krizon, sed, male, la profunda krizo kaŭzita de la hamburgaj eventoj necesigis la *idean daŭrigon de la antaŭhamburga U.E.A.* pere de N.E.M.
- Kio estas N.E.M.?* — N.E.M. ne estas organizaĵo. Ĝi ne havas membrojn. Ĝi konsistas el ĉiuj Esperanto-parolantoj, kiuj — ĉu en U.E.A. mem, ĉu ekster ĝi — apogas la principon de strikta religia kaj partipolitika neŭtraleco, *kiel difinita en la Statuto de U.E.A. kaj kiel observata ĝis la Universala Kongreso en Hamburgo*.

La plej grava laŭtparolilo de N.E.M. estas *Horizonto*, kaj la ĉefaj publikaj manifestiĝoj de N.E.M. estas ĝiaj Internaciaj Konferencoj. N.E.M. jam plenumis pozitivan rolon kaj interne de la Esperanto-Movado kaj en la ekstera mondo: ĝi sukcesis malhelpi aŭ almenaŭ iom malrapidigi eĉ pli fatalajn erarojn de la posthamburgaj gvidantaroj de U.E.A., unuflanke, kaj montri al la ekstera mondo, ke la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado plu ekzistas, aliflanke.
- N.E.M. kaj U.E.A.* — Kontraŭe al tio, kion difinitaj rondoj misinforme diskonigas tra la Esperanto-Movado, N.E.M. estas nek kontraŭkomunisma, nek kontraŭkapitalisma, nek kontraŭ kiu ajn alia politika aŭ doktrina ismo, kun escepto de tiuj doktrinoj kaj sistemoj, kiuj neas la homajn rajtojn, precipe la rajton je liberaj organizaĵoj, esprimaĵoj kaj komunikado. En N.E.M., same kiel en U.E.A. ekde ĝia fondiĝo en 1908, troviĝis kaj troviĝas apartenantoj de diversaj religioj kaj politikaj partioj, inkluzive diverstendecajn socialismajn kaj komunismajn, sed ĉiuj kunligitaj per la deziro progresigi Esperanton kiel lingvan esprimon de tuthomeco kaj internacia kunlaboro en libereco. Tio ne nur ne endanĝerigis la neŭtralecon kaj sendependecon de la ĝishamburga U.E.A., sed, male, firmigis ilin. *Tute alia afero estas akcepti partipolitikajn Esperanto-instancojn, agantajn strikte laŭ la instrukcioj de la partio, kiel aliĝintajn asociojn kun multnombraj komitatoj en la supera organo, la Komitato de U.E.A.*

Tio — ne la kredoj aŭ konvinkoj de unuopuloj agantaj libere laŭ siaj konsciencoj — kaŭzis la *unudirektan politikigon de la Asocio kaj la perdon de ĝia sendependeco*. N.E.M. batalas kaj plu batalos kontraŭ la subigon de U.E.A. al difinita bloko, same kiel ĝi batalas kontraŭ la subigon de U.E.A. al kiu ajn alia politika partio aŭ politika bloko.
- Alvoko.* — N.E.M. fariĝos superflua kaj ĉiuj ĝiaj apogantoj donos la plej fortan subtenon al U.E.A., kiam U.E.A. revenos al la tradicia vojo de partipolitika neŭtraleco, hodiaŭ eble pli aktuala ol iam antaŭe. Nur tio ebligos vere efikan agadon por la Internacia Lingvo en la nunaj escepte favoraj eksteraj cirkonstancoj. N.E.M. alvokas ĉiujn sincerajn esperantistojn, inkluzive funkciulojn de U.E.A., konsciiĝi pri la graveco de la krizo kaj helpi, ke U.E.A. retrovu sin mem kiel eble plej baldaŭ en la intereso de U.E.A. kaj, multe pli grave, de Esperanto. Intertempe N.E.M. laŭ siaj eblecoj plu klopodos disvastigadi Esperanton kaj tiujn ideojn de humaneco, kiuj estas nedisigeble litigitaj al ĝi.